UNGARA VIVO

E

1

1970

8,—Ft

DUM VIA VOJAĜO EN HUNGARIO

**Vizitu niajn movmaterial-staciojn
en la tuta lando ni estas kompleze
je via dispono.**

EKSTRA BENZINO 92. NORMALA BENZINO 86.
OLEOJ „MULTI GRADEN“

AFOR
BENZIN-OLAJ

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara
Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

☆

1970. X-a jaro, 1-a numero

Béla Berceli: Dudek kvin jaroj 1
Béla Abody: Vivo — savo. Tr. *L. Tárkony* ... 2
János Tóth: Momentfotoj pri niaj matematikistoj 5
J. Szekeres: Panoramo 6
Szilárd Bálint: Tiel komenciĝis 8
Olesj Honĉar: Danuba etudo. Tr. Nadija Andrianova 10
Gábor Rudnai: Poemoj. Tr. *K. Kalocsay, János Tóth* 11
László Gyurkó: Lenin, oktobro 12
Gyula Ortutay: Humanisma etnografio 14
Kálmán Mikszáth: La majstroj de signoj. ... 15
Ádám Würtz: Grafiko 16, 17
L. Kökény: Corvina eldonos la Petőfi-poemaron 16
K. K: Intervjuo kun Lajos Kökény 18
Ada Csiszár: Nur por virinoj 20
K. K: La plej belaj vortoj 21
L. Tárkony: Haŭtsango 21
L. Tárkony: Revuo de revuoj 22
László Feleki: Famaj homoj 24
K. Kalocsay: Domfabriko 25
Lajos Lesznai: Novajoj el la Budapešta operdomo 26
La plej granda fridigo-turo de Eŭropo 27
Korespondi deziras, Leterkesto 28
Gábor Vigh: Niaj zorgoj Hungarlandaj 29
Imre Szenes: El la humoro de 25 jaroj 30
El la 2-a numero, Glosaro 31
Sándor Szathmári: Centro de Eŭropo 32
Krucenigmo 32

Sur la kovrilpaĝo: la nova Elizabeta-ponto. — Foto de János Eifert

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:

d-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Imre Botos, Ervin Fenyvesi, Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Valeria Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Ujlaky-Nagy Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:

D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato la unuan jaŭdon de ĉiu monato poŝtagmeze de la tria ĝis la sesa horo havas akceptotagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54. Telefono: 224—819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo, por individuaj abonantoj la ĉeknumero estas 61 280, por neindividuaj 61 066.

La abono estas por jaro Ft 32.-, al eksterlando krome Ft 6.40 poŝtelspezo.

69.67816 Akadémiai Nyomda, Budapest
Responda gvidanto: György Bernát
Indexszám: 25.377

Dudek kvin jaroj

La hungara popolo festas en 1970 jubilean jaron: ĉi-jare estas la dudek-kvina datreveno de la epoksignife sortoturna evento, ke la Soveta Armeo, batalante por la fina venko de sia amata patrujo, liberiginte de la landrabemaj invadintoj la unuan socialisman landon de la mondo, forpelis la faŝistojn ankaŭ el Hungario kaj liberigis la landon el sub ilia subpremo. La hitler-naziistoj kaj iliaj hungaraj kunkulpuloj forrabis el Hungario ĉion moveblan kaj detruis ĉion nemoveblan: la tuta lando kuŝis en ruinoj. Mortis pli ol sescent mil homoj, kaj la materia perdo estis nemezurebla. La restarigo kaj rekonstruo — asertis multaj — daŭros dekojn da jaroj.

Tamen, la hungara popolo, kiu ekde jarcentoj nun fine povis libere spiri, ekagis laŭ iniciato de antifaŝistaj politikaj kaj sociaj fortoj. Inter ili la Komunista Partio alvokis ĉiujn: ek al laboro, ek al restarigo de fervojo, komunikado, industrio kaj agrokulturo. Apenaŭ pasis kelkaj jaroj, kaj industrio, komunikado, la tuta nacia ekonomio atingis jam la produkto-nivelon de la lasta antaŭmilita jaro.

En tiuj jaroj la laborista klaso — havante kiel aliancanojn la kamparanojn kaj intelektularon — per ĉiuj formoj de la politika agado batalis por preni en siajn manojn la direkton de sia sorto, akiri la ŝtatpotencon. En la jaro 1948 la maldekstraj partioj kunigis siajn fortojn, venkis la kontraŭulojn — adeptojn de kapitalisma sociordo — kaj establis novan sociordon — socialisman ŝtaton.

De tiu tempo la Hungara Popolrespubliko rikoltis neniam antaŭviditan prosperon en ĉiuj aspektoj de la socia vivo.

Forigante por ĉiam la ekspluatadon de homo fare de homo, uzante kiel metodon la plan-ekonomion, rapide ĝi kreskigis la produktofortojn. Dum tiu mallonga tempo de dudek kvin jaroj, nia Hungara Popolrespubliko ĝisfunde transformiĝis. La hungara popolo nun havas modernan industrion, elstarajn teknikajn rimedojn kaj metodojn. La kolektivigita agrokulturo donas ĉiam pli kaj pli da terproduktoj al la urba loĝantaro kaj al eksterlandaj klientoj. Escepte 2—3 procentojn, ĉiuj civitanoj de la lando ricevas senpagan kuracadon, hospitalan flegadon, medikamentojn kaj financan helpon okaze de malsaniĝo. Pli ol miliono da gemaljunuloj ricevas pension. Mi povus ankoraŭ longe mencii la diversajn socialajn, higienajn, kulturajn kaj aliajn atingojn de la hungara vivo.

La Hungara Popolrespubliko en ĉiuj siaj agadoj klopodas efektivigi la plej gravan devizon: ĉion por la homo. En ĝia enlanda politiko tio respeguliĝas en la konstante kreskanta vivnivelo de la laborantoj kaj morale kaj materie. La ŝtato aprobas, helpas kaj protektas ĉiun agadon de la civitanoj celantaj la humanismajn, pacajn ideojn de la socialisma lando. Inter tiuj movadoj ankaŭ ni, esperantistoj, estas rekonataj kaj subtenataj kiel movado, akcelanta la pacan kunekzistadon de diversaj landoj kaj popoloj.

En la nunaj tagoj la hungara popolo entuziasme kaj en plena unueco festas sian plej grandan nacian feston, la 4-an de aprilo, la tagon de l'liberiĝo. Ĉiuj rekonas la epokfarajn rezultojn, atingitajn dum la pasintaj dudek kvin jaroj. Kaj ĉiuj konscias, ke la Hungara Popolrespubliko, havante la plenan fidon de siaj civitanoj, firme, celkonscie kaj neŝanceligeble daŭrigas sian agadon por pluaj rezultoj, por la ĉiam kreskanta bonstato kaj pli feliĉa vivo de la civitanoj.

Béla *Berceli*

Ĉefsekretario de la Hungara Esperanto-Asocio

Béla Abody

VIVO-SAVO

Post la 15-a de oktobro[1] Berkes pensis, ke rekudri la flavan stelon estus memmortigo. Li kalkulis kun la morto, sed ne volis memvole sin liveri al siaj murdontoj. Li trovadis rifuĝejojn, sed uzis ilin nur tiel, ke neniun li endanĝerigu, kaj ankaŭ liaj gastigantoj ne klopodis lin dekutimigi de tiu taktemo. Ankaŭ nun li serĉis kaŝlokon: rapidpaŝe li iris serĉi sian iaman pacienton, al kiu, eĉ se li ne povis fari miraklon, la vivon tamen li savis; eble li povas nun de li peti la sian.

— Ĉu estas vi, kara kolego? — li aŭdis de apude. Tuj li rekonis la voĉon de sia iama profesoro Ottó Ménesy. Li pensis, ke li iros plu, eble eĉ pli haste, sed la grizhara profesoro lin jam prenis brako en brako.

— Vi ne ekkonas la oldulon? — li diris indignete. — Jen la epoko de la malfidelaj disĉiploj.

— Mi ne volus kompromiti sinjoron profesoron — li respondis, kaj sentis, ke li ruĝiĝas ĝisverte. — Nun mi rifuĝas.

— Ĉu de viaj ribelintaj pacientoj? — ridegis Ménesy. — Mi ne mirus. Kolego mia, tio min tute ne surprizus. Vi estas pli ol iom sentalenta.

— Nu, tiam do mi . . . — diris Berkes mallerte. — Nome ien, kie unu aŭ du tagojn . . . — Li eksilentis, bedaŭrante diri eĉ tiom.

— De mi vi ne fuĝos! — stentoris[2] la profesoro tiel forte, ke du ĝendarmoj retrorigardis, unu el ili eĉ haltis por momento.

— Nu, venu, venu, ĉe mi neniu vin serĉos.

La sekvan matenon ili renkontiĝis en la antaŭĉambro. Berkes faris hezitan duonpaŝon retro, kvazaŭ por simbola pardonpeto, aŭ eble pro honto pri siaj senŝtrumpaj piedoj en la kotaj ŝuoj kaj pri sia senpantaloneco sub sia vintra mantelo. Ménesy alĵetis nur kurtan rigardon. Senmanke vojopreta, li tenis promenbastonon kun arĝenta hundokapa tenilo.

— Pri kio vi sonĝis, kolego? — li salutis sian logkunulon. Poste, ne ricevinte respondon, li ekrevadis. — Cetere nenion signifas, pri kio oni sonĝas! — li diris kun surpriza severo kaj multe pli laŭte, ol tio sekvus el lia ĵusa revado. — Fine jam lernu, ke tio signifas nenion. La vidaj manifestiĝoj de niaj deziroj estas kondensitaj kaj simbolaj. Multa alloga akvo: resopirado al la patrinutero. Flugo, birdo kaj tiaspecaĵoj estas fallos-simboloj. Vi sonĝas pri bela, bone hejtita, komforta ĉambro familiara eta hejmo? Nu, sed kial daŭrigi? Vi, kompreneble-eĉ konjekton ne havas pri ĉio ĉi. — Nun lia voĉo jam estie laca, rezignacia kaj dume li rigardis fikse la tenilon ds sia bastono, pli kaj pli sinforgese, kvazaŭ nun li vidus ĝin unuafoje.

— Ĉu la radio diris ion, mi petas, sinjoro profesoro? — demandis Berkes.

La profesoro ankoraŭ rigardis plu la arĝentan hundon.

— Ĉu ĝi diris, ĉu ĝi diris: kia demando? Tial ĝi estas radio, ke ĝi diru . . . Kun senŝanĝa impeto furiozas la Hungaria batalo. La urbon Jászberény, en la ardo de dura interlukto, ni evakuis provizore el strategiaj kaŭzoj. Samtempe niaj kirasitaj ĉaroj kontraŭatake atingis Jászárokszállás. La usonanoj penetris en Mörchingen, sed devis retiriĝi kun sanga kapo. Ĉu vi rimarkas, kiel poezie? La liriko ne pereas, eĉ kiam la cirkonstancoj ŝajnas por ĝi malfavoraj!

— Mi pensas, io pri la Hungarlanda . . . , io pri nia . . . — provadis Berkes.

Ménesy ree mishumoriĝis.

— Nu, kompreneble, vin interesas ja nur via propra sorto. La sendifekteco de via haŭto. Mi volus scii, kun kia morala rajto vi kritikas tiujn, kiuj faras tion saman kun kontraŭa antaŭsigno?

— Ĉu tiujn do, kiujn tiel same interesas mia haŭto? — demandis Berkes.

La profesoro ankoraŭ pli moroziĝis.

— Bonvolu ne spritadi! — li diris. Vi precize komprenas miajn vortojn. Vi ne estas talenta kuracisto, sed nek vi estas kompleta kreteno. Murdisto kaj viktimo pretendas rajton pri tio sama: pri la vivo de ĉi lasta. Ilia diskuto havas nuran propriet-juran naturon, havas nenion komunan kun politiko aŭ etiko. Kial fari el ĝi grandan historion?

— Ĉu mi foriru? — demandis Berkes.

— Vi ne foriros. Vi restos kaj punkto. Danku per tio, ke vi ne diros pli da stultaĵoj, ol kiom vi nepre bezonas por la konservo de via sanstato.

Pli da konversacio ne okazis ĝisvespere. Ménesy eliris,

promenis ĝis la Danuba bordo egalpaŝe kaj kun levita kapo, sen rigardi flanken. La mondo estis griza kaj vapora. Pontpiede mitralisto staradis pigre, senmove kiel sia propra statuo en vaksfigura galerio. Antaŭ spicvendejo, apud vico da 20—25 starantoj, renversita biciklo kuŝis kiel korpafita besto kun radoj rigidantaj alĉiele. »Kiu ĝin devis lasi tie? Krome, kiu kaj kial?« pripensadis la profesoro, kaj se tiam lin kontraŭvenus iu inda je lia konfido, eble li pridemandus tiun. Sed venis neniu; restis la enigmo: rebusa hieroglifo sur la tolo de la tago. Kaj alio lin ne interesis. Li spiris ankoraŭ iom el la skrapa, stagna aero kaj hejmeniris. Berkes ne elvenis el sia ĉambro.

Posttagmeze oni sonorigis. Estis la dompordistino.

— Do vi opinias — diris severe Ménesy — ke iun mi kaŝas? Diru, edzino Szlimák, ĉu vi povas pruvi vian supozon. Ĉar se ne, tio faras kompleta la faktokonsiston de honor-ofendo.

— Mi petas, sinjoro doktoro, oni nur diris tion al mi — klarigadis la dompordistino — ĉar, ĉu ne vere, la fratoj[4] prenas tiaĵon severe, kaj cetere, en tiaj tempoj, ne estas ja bone rilati kun alkurinto, kiu scias de kia speco, ĉar fakte, kiu scius tion diri... — Verŝajne li daŭrigus, sed la profesoro interrompis:

— Mi povas vin peti, ĉu ne, ke vi titolu min sinjoro profesoro? Se ne trompas mia memoro, jam kiel vicpordistinon mi provis persvadi vin por tio, kara edzino Szlimák; kiel la ekzemplo montras, kun plorinda rezultato, se paroli milde. Mi volus, ke vi komprenu — li enflamiĝis — ke sinjoro doktoro povas esti ĉiu ajn, eĉ ordinara juristo aŭ kiu tion oni donas senpage, kiel en la butiko la pakpaperon kun la varo. Tiel same mi rifuzas komunecon kun la posedantoj de la titolo »althonorata moŝto«[5] — ĉi tion Ménesy jam hurlis — kun riĉiĝintaj brokantistoj, voĉperdintaj teroristoj, alkoholistoj-koloneloj! Sinjoro profesoro mi estas!

La dompordistino levis la ŝultrojn.

La profesoro opiniis, ke ne estus malbone, se li estus al ŝi doninta trinkmonon. Sed ĉar minacon li ne povis elporti, nek amis ŝanĝi sian unuan intencon, li restis, eĉ ne akompanis eksteren la virinon.

Lia supozo ne trompis lin. Fruvespere oni sonorigis. Venis policano kaj sagokruculo. Ĝentile sed decide ili menciis »certan koncernulon«, kiu eble fuĝis en la loĝejon, certe sen la scio de la sinjoro profesoro, kaj, ke pri tio oni devas »efektivigi domtraserĉon«.

— Bonvolu! — kuraĝigis ilin Ménesy. — La hungara homo estas gastama. Volonte enlasas fremdulon eĉ en sian necesejon. — Kun kelka kontentiĝo li aŭdis, ke ili titolas lin sinjoro profesoro; tiu Szlimákino estas lernema, kvankam ŝi estas trans kvardek. Ne estas senespera la sorto de l'homaro.

Berkes ne estis trovebla, ĉar posttagmeze, nenion dirinte al la maljuna mastrumantino, li forlasis la loĝejon tra posta elirejo, kun doloranta kapo, por sciigi sian fraton, kaŝiĝantan ie, pri sia stato. Poste, li decidis, ke li estas senpova, nenion alian li povas fari ol resti ĉe sia protektanto. Ĉi tion ankoraŭ unufoje li pri- kaj trapensis. Lia kapdoloro mildiĝis, eble ĉar li ne fumis; li ne volis peti de la profesoro cigaredon kaj lia provizo jam estis konsumita. Li rapidigis do siajn paŝojn por iri hejmen. Ĝuste tiam li alproksimiĝis, kiam la policano kaj la sagokruculo adiaŭis la profesoron. Rapide li retiriĝis, serĉante ŝirmon en enirejo de vestvendejo, kaj eliris de tie nur, kiam la du vizitintoj jam malaperis.

Ménesy ne ŝajnis speciale ekscitita. Restis enigmo ankaŭ tio, ĉu li sciis, ke la domtraserĉado estos senrezulta.

— Mi diris al ili, ke iu intence trompis ilin, por ke, dum ili flaraĉas tie ĉi, oni faru post ilia dorso ian teruran bolŝevistan atencon. Tial ili do rapidis. Se vi estus vidinta Szlimákinon! — li hahais.

— Ree vi parolas tro multe! — diris onjo Julinjo; — anstataŭ forigi piedpuŝe tiujn geedzojn Szlimák ankoraŭ ĝustatempe.

— Vi estas severa al mi super miaj meritoj! — opiniis la profesoro. — Ankaŭ ili devas vivi. Negoco de murdisto estas murdi, tiu de viktimo estas sanktiĝi. Al ĉiu laŭ lia plaĉo. Du manieroj de beatiĝo: ili bonege kompletigas sin, eĉ estas kondiĉoj unu de la alia; ĉu vi ne opinias? Ĉu certe, ke unu pli noblas ol la alia? Aŭ pli utilas? Koncerne la tro da parolo, temas pri tiel nomata psikologia suplementa reago. Ĉu vi scias ion pri tio, kolego? Vi estas malbona kuracisto. Kulpe neorientita. Jam kiel studento vi ne sekvis la aktualan fakliteraturon, kaj la senpagaj pacientoj kriegis, kiam vi pikis en ilian postaĵon.

— Ĉu mi povus ricevi cigaredon? — demandis Berkes.

— Sed nur unu! — diris la profesoro incitite. — Hieraŭ vi ĝojis, ke vi entute vivas, hodiaŭ jam eruptas el vi la hedonismo[6].

— Mi ne petas — kun mallerta gesto Berkes rifuzis la ledan cigaredujon prezentitan.

— Nun mi jam rezignis pri unu cigaredo por via bono, ĝi estas do via. Vi faros per ĝi, kion vi volas: ĉu vi ĝin forfumos aŭ ŝovos en vian postaĵon aŭ kuiros el ĝi teon, tio ne estas mia afero.

— Tiam mi retiriĝos do — diris Berkes.

— Kiel vi volas. Faklibron vi ne petas, kompreneble. Mi ĉehavas freŝan svisan studon pri la distingaj simptomgrupoj de la tiroida kaj hipofiza adipozoj[7]; legu ĝin, vi legos ĝin ne senbezone.

— Nun mi ne povas legi — diris Berkes.

— Kvazaŭ alitempe vi povus! — grumblis la profesoro. Mi rimarkas — kaj li rigardis la ventron de Berkes — ke vi apartenas al tria simptomgrupo. Vi estas eŭnukoida dikulo. Ĉu vi jam havis aferon kun virino?

— Mi surmetos la teon — diris onjo Julinjo kaj eliris. Berkes ruĝiĝis.

— Entute, ĉu vi estas viro?

Berkes rigardis la pinton de siaj ŝuoj, spiris laŭtblove, entiris la kolon, rapide palpebrumis, vere tre malbela, ne simila al ia sprita karikaturo, kiu povus akceptigi aŭ devige trudi al la mondo la groteskajn leĝojn de sia vizaĝo. Li estis falema kaj ĝuste tial defia: malrapidema, ŝvelokula, ŝvitvapora, mola maso nekapabla je sindefendo, tronutrita kobajo preparĝanta por sia stulta sorto.

— Vi probable efeminiĝos, virineskiĝos. La testikoj ne descendis. Eventuale adenomo de surrena glando. Ĉu vi komprenas aŭ mi traduku? Kiel oni vin klasifikis el patoanatomio?

— Per »kontentiga« — diris Berkes. — Nun mi adiaŭas Kaj se mi ĝenas aŭ alportus ian danĝeron...

— Vi restos, kolego. Kien ja vi irus?

— Tiam do kun danko...

— Ne dankadu — admonis lin Ménesy. — Sufiĉe vi estas ja plagita. Ne la persekuto: en ĝi troviĝas io justa.

— Justa? — demandis Berkes. — Li sentis, ke lia ĉemizkolumo kovriĝas per ŝvito, kaj ke sen malfermo de la supra butono li sufokiĝos.

— Ne nepre tial, ke vin aŭ vin ĉiujn oni persekutas —, instruis lin la profesoro. Foje, en eksperimento, oni miksadis diversproporcie ruĝajn kaj nigrajn formikojn. La plimulto ĉiam atakis, ĉu vi kredas, ĉu ne. Por la malplimulto restas la mito de la persekutateco. Tion oni povas plu rafini: meti signon de egaleco inter rifuĝo kaj sinoferemo, deviga senpoveco kaj spita ermiteco, sencela pereo kaj martireco. Ĉiom ĉi estas mensogo, mensogo de febluloj.

— Vi pensas do, sinjoro profesoro, ke ĝusta estas, kio estas?

— Ĝusta? — alrigardis rigide la profesoro. — Kial do ĝusta? Kio do tio: ĝusta? Ĉu korplaĉa, eble? Aŭ estetika, agrabla, altira? Tute ne, kara kolego. Ĝi estas la neevitebla. Ian principon de selektado oni bezonas ja. Oni povus preni la harkoloron, la korp-altecon, la mezuron de certaj korpopartoj, la pezon, sed kial inventi ion novan anstataŭ la miljaraj tradicioj. Mi povas aldoni, ke en via kazo tiu malfacile motivebla, sed almenaŭ tradicia ideo feliĉe kongruas kun la principo de kvalita selektado.

Berkes paliĝis.

— Ĉe via unua rigorozo[8] vi ne sciis, kio estas Cushing-malsano! — riproĉis lin la profesoro. — Faru konscienc-ekzamenon, Berkes.

Berkes senvorte sin klinis kaj iris en sian ĉambron.

Sekvatage ili parolis malpli multe. Onjo Julinjo demandis, ĉu ŝi ne hejtu en la banĉambro; tion li rifuzis kun konfuza rideto. Vespere la profesoro kriis en lian ĉambron.

— Mi proponas al vi glason da rumo.

— Mi dankas, tre kompleze de sinjoro profesoro, sed mi ne kutimas ĝin trinki.

— Ĉar vi pensas, ke ĝi damaĝas la hepaton! — lin atakis la profesoro. — Lernu do ion: nur tiam, se la organismo ne ricevas la bezonatan albuminon. En hospitala eksperimento, duono de la hepatituloj estis kuracata tradicie, plus kun severa abstino, la alia duono ricevis tage du decilitrojn da ĝino kaj unu horon gimnastikis surplanke. Ambaŭ partoj samproporcie akiris hepat-fibrozon, respektive resaniĝis.

— Ĉu vere? — demandis Berkes.

— Mi vin ne trompos ja!

— Sed ne, tamen ne, mi dankas.

— Diru, ĉu vi aprecas ĉi tiujn apartajn lecionojn? Vin ja ne interesas via fako! Vi timas!

— Mi timas.

— Anstataŭ akiri rajton por la vivo. Por ke vi havu pri kio timi! — leviĝis la voĉo de la profesoro. — Kial vi vivas, Berkes? Kian krimon faros tiu, kiu vin murdos? Kion li detruos tiam?

Berkes silentis.

La sekvantan matenon, kiam Ménesy eliris por la kutima promeno inter du aer-alarmoj, onjo Julinjo, ĝisatendinte lian foriron (ĉar ŝi vidis, ke ilia gasto estas tro hontema kaj ne venas al la komunaj manĝadoj), frapetis sur la pordo de Berkes, portante pladon kun bona varmega teo, sukero, eĉ citrono, pecego da pano, margarino kaj fromaĝo. Neniu respondis, do ŝi eniris: la ĉambro estis malplena, mankis ankaŭ la malriĉa pakaĵo de la gasto. Nome, Berkes fuĝis frumatene. Apenaŭ pasis kvin minutoj, li jam trafis en razion[9], oni portis lin en sago-kruculan domon kaj tie tuj en la pordego li ricevis tian survangon, ke duonsvene li falis al la muro kaj lia vizaĝ-haŭto krevis. Malrapide li glitis surteren, sentis vertiĝon kaj fortan vomemon. Dume la aliajn oni pelis al lignotenejo. Kelkaj obstinis, tial ankaŭ la sagokruca pordeg-postenulo enkuregis por helpi kaj pafis kurtan serion super la kapon de la ekscitita amaso. Tiam Berkes dolore sin levis kaj lant-paŝe, kun entirita kolo foriris tra la sengarda pordego. La postajn du monatojn li pasigis en proksima preĝejo; tie al la sakristiano li donis sian Omega-horloĝon kaj sian monreston, ĉ. 200 pengojn, kiujn, post kurta protestado, la sakristiano akceptis, ekskuzante sin per sia granda familio, kaj aldonante, ke li ĝoje helpus ankaŭ sen tio. Berkes tre timiĝis pro la unua soveta soldato, ĉar ĉi tiu forte frapis lin surŝultre kaj diris »haraŝo«, kio sonis timige, sed de alia soldato li ricevis brunan paneton. Ĝin li jam tre bezonis, ĉar li ŝanceliĝadis de malsato.

En marto de 1945 li ricevis invitilon de la universitato: oni alvokis lin kiel sav-atestanton al la kontrolkomisiono en la afero de Ménesy. Oni akuzis lin verŝajne pri lia patroneco en Studentkamarada Societo,[10] kiun honoron li abdikis en 1942. Berkes ne aliris, sed letere komunikis, ke Ménesy savis lian vivon. La profesoron oni ekskuzis kun riproĉo. Berkes transloĝiĝis al Cegléd kaj fariĝis tie asista kuracisto en la urba hospitalo. Tien oni postsendis la dankan nomkarton de la profesoro, kaj ĉi tiun sekvatage li respondis per ĝentila letero.

Tradukis: *Lajos Tárkony*

Béla Abody (1931—) eseisto, novelisto, aŭtoro de radio-dramoj kaj teatraĵoj, ŝatata parolanto televida pri libroj kaj muziko. Ĉi tiu novelo pri la neelportebla bonfaranto aperis en la gazeto »Vivo kaj Literaturo.«

1. *La 15-an X. 1944.*, post la fuŝita »elsalto« de Horthy el la Hitlera milito, la potencon transprenis, helpe de la germanoj, la hungaraj faŝistoj, la *sagokruculoj*, tiel nomataj laŭ ilia emblemo: kruco kun sagohokoj ĉe ĉiuj kvar finoj. — La *flava stelo* estis — laŭ mezepoka tradicio — diskriminacia signo de judoj en hitlerejo.

2. *Stentori:* voĉi laŭtege kiel Stentoro, greko havanta fortegan voĉon en Iliado.

3. *Fallos* (greke): vira generorgano kiel kult-objekto.

4. *Frato* sin nomis reciproke la sagokruculoj.

5. *Althonorata moŝto:* iama titolo, distinganta inter aliaj ankaŭ universitatajn profesorojn.

6. *Hedonismo:* plezura vivo kiel vivprincipo.

7. *Hipofizo:* sendukta glando kraniobaze; *adipozo:* nenormala dikeco.

8. *Rigorozo:* universitata ĉefekzameno.

9. *Razio:* amasa legitimigado por trovo de ial persekutataj personoj.

10. *Studentkamarada Societo:* tiaj student-rondoj tiamaj, imitaĵoj de la germanaj »burŝenŝaftoj«, havis rasisman karakteron.

Momentfotoj pri niaj matematikistoj

La »plirapidiĝanta tempo« postulas aplikon de ĉiam pli efikaj metodoj sur ĉiu tereno de la scienco kaj tekniko. Kaj unu el la iloj de la metodevoluigo estas la — pli kaj pli vastronde aplikata — matematiko. Per la prezentado de kelkaj, ankaŭ eksterlande konataj kaj rekonataj hungaraj matematikistoj ni provas konigi la situacion de la hungara matematiko, aprecata inde jam delonge.

En la jaro 1880 naskiĝis unu el la plej grandaj hungaraj matematikistoj de nia jarcento, Lipót Fejér. *Lia plej signifa invento, la Fejér-teoremo iĝis deirpunkto de la esploroj koncernaj la* Fourier-ajn seriojn. *Ni demonstras la efektivecon de la Fourier-a analitiko per unu ekzemplo. Kiel konate, la tembron determinas la harmonoj aliĝantaj al la baza sono. Bildo de sono de muzikilo estas perioda kurbo. Se ni sukcesas malkomponi ĉi tiun kurbon en ĝiajn komponentojn, tiam ni scias, kiaj harmonoj kaj baza sono konsistigas la originalan muzikan sonon. La Fourier-a analitiko ebligas ĉi tiun malkomponadon kaj krom ĉi tiu simpla tasko ĝi taŭgas solvi nombrajn fizikajn problemojn.*

Apud sia scienca agado li estis grandefika pedagogo de pluraj generacioj da hungaraj matematikistoj.

Eble ne estas seninterese, ke al liaj plej bonaj amikoj apartenis granda poeto romponta novan vojon sur alia tereno: Endre Ady.

Stranga hazardo, ke en la sama jaro, kiel Fejér, naskiĝis la alia plej granda matematikisto de nia jarcento, Frigyes Riesz.

Oni rigardas lin, kaj la francan M. Frèchet *fondintoj de la* topologiaj spacoj. *La topologio esploras la plej ĝeneralajn geometriajn ecojn: ĝi formas fundamenton de multaj branĉoj de la matematiko. El inter ĝiaj aplikoj ni mencias nur la planadon de* elektraj cirkvitoj *kaj la* lingvomodeladon.

Inter 1903 kaj 1957 vivis János Neumann, *la hungardevena matematikisto aganta en Usono. Sur la tereno de la matematika logiko la unua li ellaboris aksioman konstruadon de la* ensemblo-teorio, *kiu eliminas la tiel famiĝintajn antinomiojn de la »naiva« ensemblo-teorio. Unu el tiaj antinomioj, la »Russel-a«, povas esti montrata populare — ŝerce — jene:*

La barbiro de la vilaĝo estas la viro, kiu razas tiujn kaj nur tiujn virojn de la vilaĝo, kiuj ne razas sin mem. Supoze, ke la barbiro razas sin mem, tiam — laŭ la unua frazo — li ne *razas sin mem (ĉar lin razas la barbiro). Se li ne razas sin mem, tiam (ĉar tiajn razas la barbiro) tamen* li *razas sin* mem.

Tiaj antinomioj kompreneble skuus la tutan konstruaĵon de la matematiko. El tio ni povas vidi la neeviteblecon kaj signifon de strikte ekzakta establado de le ensemblo-teorio.

Ni menciu ankoraŭ la rolon de J. Neumann en la fondado de la teorio de ludoj. *Ĉi tiu teorio havas gravegajn* ekonomiajn *kaj* taktikajn *aplikojn. (Ni pensu pri tio, ke laŭ ĝenerala koncepto ankaŭ inter la aĉetanto kaj vendisto, inter la defendanto kaj atakanto temas pri ludo, tio estas: certaj reguloj regas la partnerojn.)*

Kiuj okupiĝas pri la ekonomiaj aplikoj de la matematiko, tiuj konas la tiel nomatan hungaran metodon. *Ĝi ricevis la nomon de tie, ke ĝi baziĝas sur teoremo de hungaraj matematikistoj, de* D. Kőnig *kaj* J. Egerváry.

Ni rigardu ekzemplon, kiun oni povas solvi per tiu ĉi metodo. Sesdek aerlinioj de franca aertrafika entrepreno tuŝas dektri urbojn. Kiel devas esti postenigata la personaro, ke la elspezoj de ilia transporto hejmen kaj laborloken estu minimuma, konsidere de la kutimaj obstakloj kaj kondiĉoj: neniu laboru senripoze pli longe ol dekkvar horojn, neniu flugu pli longe, ol ok horojn ktp.? Per provado kaj manaj metodoj la solvo bezonus jarcentojn, *helpe de la hungara metodo oni solvis ĝin per komputilo en ok horoj kaj per la tiel ricevita optimuma laboroganizado oni sparas ĉiujare proksimume* 100 milionojn *da frankoj.*

Krom la elkaptitaj ekzemploj — laŭ niaj eblaĵoj kaj manke de historia perspektivo — ni devas kontentiĝi per tio, ke ni vicigas la nomon de kelkaj hungardevenaj matematikistoj, vivantaj kaj nelonge mortintaj, grupige laŭ iliaj agad-lokoj:

Usono: P. R. Halmos *(lia mezurteoria libro estas unu el la plej ofte citataj; ĝi aperis en multaj lingvoj),* Gy. Pólya, G. Szegő, T. Radó, O. Szász. *Irlando: K.* Lánczos. *Svedujo:* M. Riesz *(frato de F. Riesz). Izraelo:* M. Fekete.

Argumentoj pri la internacia reputacio de niaj enlandaj matematikistoj estas la nombraj de eksterlando venantaj invitoj. (Du ekzemploj el la proksima estinteco: A. Rényi *lekciis dum la pasinta semestro en Anglujo; en junio veturis delegitaro al Kanado.)*

Ankaŭ niajn enlandajn kongresojn partoprenas multaj eksterlandaj scienculoj (ekzemple en aŭgusto la Budapeŝtan kaj la Balatonfüredan).

El la legantoj certe konas kelkaj la libron de C. Vörös, *verkitan* Esperante, *kies titolo estas:* Analitika geometrio absoluta.

Nia konigo tute ne enhavas la nomon kaj agadon de ĉiu signifa hungara matematikisto; ĉi tio ne estas ebla inter la konkretaj kadroj, sed ni sentas kaj esperas, ke ni donis proksimume fidelan bildon de tiu ne malestiminda rolo, kiun la hungaraj matematikaj esploroj okupas en la matematika scienco de la mondo. János *Tóth*

panoramo

Per fremdultrafika vidindaĵo riĉiĝis fine de la pasinta jaro la Nordhungarlanda vilaĝo Rudabánya: tie oni malfermis la unuan subteran ministan muzeon de la lando. En la muzeo troviĝas memorobjektoj reprezentantaj la evoluon de la landa erc- kaj mineral-elfosado. En malgranda subĉiela muzeo antaŭ la enirejo de la subtera muzeo oni kolektis la laborilojn de tiu sama metio.

La Budapeŝta Medicinscienca Universitato festis en novembro la 200-jaran datrevenon de sia ekzisto, kun la ĉeesto de la reprezentantoj de 47 en- kaj eksterlandaj universitatoj. La kvarona jarcento, pasinta de post la liberiĝo de la lando, alportis grandajn rezultojn ankaŭ en la medicinscienco kaj sanigado. Duobliĝis la nombro de la studentoj: la universitato instruas nun kvarmil medicin-studentojn. La nivelon de la scienca laborado en la universitato spegulas, ke naŭ akademianoj, dudek du doktoroj de la medicinsciencoj kaj 137 kandidatoj al tiu doktorecoj funkcias en la institucio.

* * *

Novembre de la pasinta jaro en Budapeŝto oni aranĝis internacian ekspozicion pri la aŭtomatizado, kun la partopreno de kvar ekspozantoj de ok landoj.

* * *

La hungara entrepreno TANNIMPEX eksportas al dudek landoj ledkaj peltovarojn, nome produktojn preparitajn kaj konfekciitajn fare de la enlanda industrio. Precipe sukcesaj estas la hungaraj felopeltoj (la ellaborita haŭta flanko estas ekstere nuda, netegita), ŝafidpeltoj kaj la tn. »panofix«-peltoj (ekstere kun tondita, rafinita, polurita hararo).

Okaze de la 300a datreveno de la morto de Rembrandt, la Budapeŝta Belarta Muzeo per riĉa ekspozicio solenis la grandan artiston.

* * *

En la urbo Szentendre, situanta proksime de Budapeŝto, oni konstruas skanzenon sur areo de 50 hektaroj. Sur ĝia teritorio troviĝos 11 »mikrovilaĝoj«, en kiuj la en- kaj eksterlandaj vizitantoj povos vidi la karakterizajn loĝdomojn kaj mastrumajn domojn kaj instalaĵojn de la diversaj regionoj de la lando.

* * *

Per valoraj kaj kuriozaj novaj libroj surprizis siajn legantojn la Libroeldonejo Corvina. En la germana lingvo aperis »Bibliotheca Corviniana«. La verko, ilustrita per 143 koloraj bildoj, prezentas la plej valorajn ekzemplerojn de la biblioteko de la hungara reĝo Matiaso (regis 1458—1490), kiuj ekzempleroj estis poste disportitaj dise en la mondo. En komuna eldono kun la Viena eldonisto Schroll aperis la duvoluma libro de Vinzenz Oberhammer kun la titolo »La Viena Pinakoteko«. En la lingvoj germana kaj angla aperis en la librovendejoj la volumo »Budapeŝtaj Muzeoj«, kiu sur 168 reproduktaĵoj prezentas la artvalorajn de la plej grandaj muzeoj de la ĉefurbo.

Okaze de la 25a datreveno de la liberiĝo de Pollando la Budapeŝta Informa kaj Kultura Centro de la Pola Popolrespubliko aranĝis Esperantlingvan vesperan prezentadon. S-ano J. Baranowski, la vicprezidanto de la regiona Esperanto-Komitato KOSZALIN prelegis pri la temo »Polaj Nordaj kaj Okcidentaj Teritorioj en dek kvin jaroj de Popola Respubliko«. Post li Jadwiga Gibczyska, aktorino de Popola Teatro en Krakow-Nowa-Huta deklamis el la verkoj de polaj poetoj. La grandnombra publiko de la vespero akceptis danke kaj kun rekono la laŭdindan iniciaton.

* * *

La Eŭropa Ekonomia Komitato de UN. aranĝis en 1961 en Genevo sian sian unuan simpozion pri urbo-rekonstruado. La komitato, preparanta la novan interkonsiliĝon, faris sian trian kunsidon oktobre de la pasinta jaro en Budapeŝto- En tiu kunsido oni decidis, ke la dua simpozio okazos en Budapeŝto, inter 27. IV. — 7. V. 1970. En la tagordo de la interkonsiliĝo troviĝos prelegantoj krom el Sovetunio kaj Usono ankaŭ el Britio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Francio, Nederlando, Pollando, Jugoslavio, Norvegio, Germana Federacia Respubliko, Italio, Hispanio, Svedio kaj Rumanio.

panoramo·panoramo

panoramo·panoramo

Fine de la pasinta jaro en Budapeŝto aranĝis sian interkonsiliĝon la ekonomi-fakaj ĵurnalistoj de la Eŭropaj landoj.

* * *

27—30. 8. 1971. oni aranĝos en Hungarlando la unuan tutmondan ĉaskongreson. Atentindaj estas la aranĝoj planitaj por disvolvo dum la daŭro de la kongreso: la internacia kongreso de la priĉasaj sciencaj esploristoj, la naturrezerva kaj la fiŝkaptada simpozioj, la ekspozicio riĉa je nuntempaj kaj muzeovaloraj objektoj de la figuraj artoj kun temoj koneksaj kun la ĉaso kaj fiŝkaptado, hundekspozicioj, hund- kaj ĉevalkonkursoj, kvintaga rajdekskurso, aŭtuna ĉasvagado.

* * *

Pere de la fabrikado de la tn. rulplugilo (plugilo provizita per cilindretoj) la agrokooperativo en la vilaĝo Csataszög akiris internacian renomon. La eltrovo estas registrita kiel patento jam en 28 landoj kaj al ĝiaj aĉetantoj aliĝis nun kiel la dekdua ankaŭ Usono.

Estas 300 jaroj, ke en Nederlando forpasis Amos Johano Comenius, la eminenta ĉeĥa pedagogo, kiu, invitite de la Transilvania regnestrino Suzana Lorántffy, dum pluraj jaroj estis la direktoro de la kolegio en la urbo Sárospatak. Okaze de la datreveno la urba konsilantaro de Sárospatak farigis Comenius-memorplaketon, sur kiu estas videblaj unuflanke la malnova kolegio, aliflanke la portreto de Comenius.

En la urbo Novisad (Jugoslavio) aperis la unua numero de la sciencaj publikaĵoj de la Hungarologia Instituto, fondita en la pasinta jaro. Tiu numero traktas la diversajn problemojn de la hungaraj lingvo, literaturo, kulturhistorio kaj folkloro.

* * *

En la 6a internacia vin-konkurso, post la sumigo de la kvalifikaj poentoj kaj gajnitaj medaloj, Hungarlando fariĝis la unua en la granda internacia vetbatalo. Precize: 115 orajn, 261 arĝentajn kaj 6 bronzajn medalojn gajnis la hungaraj vitkultivaj ŝtataj bienoj, kooperativoj kaj individuaj kultivistoj. Per du sekbervinoj — devenantaj el la vit-regiono de Tokaj — Hungarlando gajnis ankaŭ la du ĉefpremiojn de la vin-konkurso. — La rekonon de la internaciaj fakspertuloj al Hungarlando demonstras ankaŭ la rezolucio, laŭ kiu la vin-olimpikojn de 1972 oni aranĝos en Budapeŝto.

* * *

En majo okazos kunveno de poetoj en Balatonfüred, kiel daŭrigo de la poeto-renkontiĝo okazinta en Budapeŝto antaŭ kvar jaroj.

Elstara evento de la Budapeŝtaj Priartaj Semajnoj estis la debuta prezentado de la opero de Emil Petrovics kun la titolo: »Peko kaj puniĝo«, prezentita en la operejo, la 26an de oktobro. La libreton de la opero verkis Gyula Maár surbaze de la samtitola romano de Dostojevskij. Helpe de scenoj, ludataj samtempe en la horizontale kaj vertikale disdividitaj scenejospacoj, oni povas sekvi en filmeska prezentado la pensojn kaj agojn de Raskolnikov, ekde la ekĝermo de la penso pri murdo ĝis la plenumo kaj pripento de la ago. La dekoraciojn projektis Gábor Forray, la dirigento estis András Kórodi, reĝisoris András Mikó.



panoramo

TIEL KOMENCIĜIS

Tiutempe, en la aŭtuno de 1944, mi estis ĉefo en iu Budapeŝta stacio kaj ĉiutage mi alvojaĝis de Gödöllő distancon de 20 kilometroj, sed tiu vojaĝo tiam, pro la ofta bombado kaj alarmo, daŭris ofte plurajn horojn. En oktobro Gödöllő estis invadita de germanaj soldatoj kaj baldaŭ la vilaĝo fariĝis batalejo: en la pejzaĝo, belega en la mirinde bona vetero, eksplodis kanon-grenadoj kaj aerminoj. Mia edzino estis graveda kaj malsana, mia 9-jara filino frostetis, la fenestroj de nia loĝejo rompiĝis de eksplodoj. Ni do kunpakis niajn plej necesajn aĵojn kaj transloĝiĝis al Budapeŝto. Trajnoj tiam ne iris jam, la vojo daŭris tri tagojn. Ni trovis malplenan loĝejon ĉe la stacidomo kaj nokte ni kuŝis tie sur pajlo ŝutita sur la plankon.

Komence de januaro per lorno oni jam povis vidi la sovetajn soldatojn, kiuj puŝis sin antaŭen en larĝa svarmlinio sur la neĝkovrita kampo. La germanaj soldatoj retiriĝis, restis nur la postgvardio kaj la eksplodigaj taĉmentoj. Ĉi tiuj volis ĉion bruligi kaj detrui. La subteraj oleocisternoj tamen ne eksplodis, ĉar la tiean elektrokondukilon ni sukcesis distranĉi.

Tri tagojn ni pasigis en malluma, malseka kelo inter ratoj kaj vermoj, dum supre furiozis la infero de fajro, eksplodoj kaj pafoj. Poste en humida grizo ni fosis tombojn per ruĝaj ventoblovitaj manoj, por enterigi la ostodure frostajn mortintojn. Per hakilo ni tranĉis por ni viandon el ĉevaloj mortintaj, elgratitaj el sub la neĝo.

La rusaj frontsoldatoj senhalte marŝis antaŭen al la urbocentro. Kelkaj venis traserĉi la loĝejojn, demandis pri germanoj kaj armiloj.

Malrapide malaperis la timo, kiun plantis en la loĝantojn la sagokrucula propagando disvastiganta famon pri teruraĵoj; mortpafo de ĉiu iom bone vestita homo kaj similaj. La sovetaj armeanoj mistraktis neniun, eĉ ridetadis kaj karesis la infanojn, dirante ian afablaĵon nekomprenatan.

Ni estis lacaj, malsataj, suferantaj de malvarmo, sed feliĉe enspiris la freŝan aeron, ĝojante, ke ree la vivo estas nia.

La soldatoj fervore laboris por la restarigo de la reloj kaj post nelonge jam alveturis la unua ŝargvagonaro. Alta soldato, juna blondulo, serĉis la ĉefon. Fervojisto scianta slovake interpretis:

— Ĉu vi estas la ĉefo?

— Jes . . . — mi respondis.

— Vi nur estis, nun jam estas mi! Mia nomo estas Gavriel Vasileviĉ Duhanin. — Kaj li ĉirkaŭrigardis en la kontoro, vidis tie rompitajn seĝojn kaj meblojn kaj fumumitan petrolan lampon sur la tablo. Li alrigardis min. — Ĉu vi ne havas pli bonan vestaĵon?

— Mi ne havas.

— Iru do ŝoveli karbon el la vagono!

Hm. Tio ne estis agrabla tasko en la malvarma vintra vaporo. Sed mi tuj aliĝis al la homoj ŝovelantaj el la vagono la ŝarĝon. Pro la nekutima peno mi baldaŭ komencis ŝviti kaj vidis nigrajn ringojn sur la blanka neĝo.

La nova ĉefo rigardadis tion kun longa cigaredo en sia buŝo, sed post duonhoro li saltis sur la vagonon, forprenis de mi la ŝovelilon kaj facile ĝin turnadis, ĝis la vagono malpleniĝis. Poste, en la oficejo, li donis al mi brandon el ladbotelo kaj diris ridetante:

— Se vi volas esti bona ĉefo, vi devas esti sperta en ĉia laboro . . . Mi opinias, ke ni du kune povos solvi ĉiun aferon.

Tiel komenciĝis.

La forta brando disfluis en mia korpo, kaj mi komencis senti al Gavriel ian varmon en mia koro.

En Peŝt kaj Buda ankoraŭ furiozis la batalo, sed en ĉi tiu urboparto jam komenciĝis la ordinara vivo: ŝarĝotrajno sekvis ŝarĝotrajnon, riparitaj lokomotivoj pafetis vaporon kaj fumon, pli kaj pli da hungaraj fervojistoj alvenis labori.

En la oficejo ni ambaŭ laboregis, sen interpretisto, miksante vortojn hungarajn kaj rusajn, helpante nin per grandaj gestoj. Gavriel ridis rigardante miajn tabelojn, sur kiuj la rusajn vortojn mi skribis per majuskloj, konante nur tiujn.

En marto, ĉirkaŭ noktomezo, Gavriel sendis voki min. Ĉeestis oficiala interpretisto. Ni faris dulingvan protokolon pri transdono kaj post la subskribo, sciiginte min, ke lin sendas ordono aliloken, li diris:

— La rusa fervojisto-soldato nur estis ĉefo, nun jam estas vi! Mi deziras feliĉon kaj bonan laboron!

Li ĉirkaŭbrakis min kaj promesis, ke li sciigos min pri sia sorto. Kaj mi sciiĝis, ke kapitano Duhanin falis batale en Okcidenta Hungario.

Szilárd Bálint

JÁNOS PILINSZKY

HARBACH 1944.

Mi vidas ilin ĉiam ree:
timon' rigidas en lunbril'
kaj homoj estas aljungitaj
por tir' de ega veturil'.

La ega veturilo kreskas
kun kreska nokto pli kaj pli,
ilian korpon polv', malsato
kaj trem' dividas inter si.

Pecojn da vojo, da pejzaĝo,
da frostetanta terpom-kamp'
ili kunportas, sed el ĉio
nur ŝarĝon sentas dum la ramp'.

Nur la faleman najbar-korpon
proksiman kvazaŭ ĝis kunglu',
dum vice en tavoloj vivaj
ili ŝanceliĝadas plu.

Vilaĝoj ilin evitadas,
pordegoj restas trans vidlim',
renkonte venas kaj titube
retrokuradas malproksim'.

Stumblante, en la sombra bruo
de sia lignoŝua paŝ'
jen ili vadas ĝisgenue,
kiel se en folifalaĵ'.

Ilia trunk' — jam al la muto.
Vizaĝoj, trempe en la alt',
streĉiĝas, kvazaŭ flaras fore
trinkujojn de ĉiela halt'.

Ĉar por akcepti ilin, kiel
brutej' kun apertiĝa pord',
kun la sovaĝe dispuŝitaj
pord-aloj pretas jam la mort'.

Tradukis: *K. Kalocsay*

LAJOS HOLLÓS KORVIN

PATRUJ' VI ESTAS FINE...

Patrujo fine, lando stelvizaĝa!
Mi kvardek jarojn mizerule, fremde,
kiel servistoj kromaj, sub sovaĝa
trudpen' vegetis, ribeladis plende.
Nun jam ne ter' de bankier', ĝendarmoj,
distriktpaŝaoj, aĉaj denunculoj,
ho, tenerfingre kvardekjarajn larmojn,
doloron blindan viŝu de l'okuloj!
Vi stas jam nia, laborul-patri',
mi en ruinoj viaj vin karesu!
ĝarden' de rozoj estu pli kaj pli,
en ĉiuj frondoj kanti bird' ne ĉesu!
Rekresku domoj kuŝaj nun peree,
la pontoj, al mi okultrezoro kara,
de Peŝt al Buda pompe arku ree,
ord' estu, gaja, paca, riĉofara!
Popolo de plugil', martelo, plumo,
ni floru nun en vi kaj vi en ni,
nin, verajn filojn, prenu al brakumo,
ter' de Libero, dolĉa Hungari'!
(1945)

Tradukis: György *Szondy*

K. KALOCSAY

PATRUJO MIA

Patrujo mia, kiu el profundo
elrampis kaj konfuze, duonsvene
l'unuajn paŝojn provas senkatene,
de hont' kaj sango ruĝas via frunto.
Sed kiun al vi propaganda grunto
prezentis kiel peston, jen, serene,
la malamiko venas helpoplene,
ke vi stariĝi povu sur la grundo.

Ĝi ne almozon vantan al vi donas,
sed prenas vin je mano kaj admonas:
»Kuraĝon, lernu marŝi kaj paŝegi!
Jen la liber'. Nun estu via volo
ĝin preni, gardi, uzi kaj reveki
la fortojn, kiuj dormas en popolo!«
(1945)

SENREZERVE

Ho, kiel en la buba aĝ' mi flamis
por mia dolĉa patrolanda tero!
Rákóczi, Kossuth, Kvardekok, Libero!
Poemojn patriotajn mi deklamis.
Kiel malplene poste jam tamtamis
la vort' patrujo. Ĉar popolkarcero
mi ĝin ekkonis, kie el mizero
tri milionoj da almozuloj klamis.

Ĉe kies son' popolon oni tretis,
la Himnon el la buŝo mi forĵetis,
sed nun, ho kia sankta sensacio
revivi bubmemorojn, kanti verve
la Himnon apud la Internacio,
kaj vin, patrujo, ami senrezerve.
(1945)

Okaze de la 25-a datreveno de la liberiĝo de nia patrujo ni prezentas la suprajn poemojn kaj tiun de Tárkony (pĝ. 20). La poemo de J. Pilinszky vizias la antaŭajn teruraĵojn, la aliaj naskiĝis en la etoso de feliĉa malpeziĝo kaj solena entuziasmo.

Olesj Honĉar

DANUBA ETUDO

En la somero de 1945, tuj post la fino de la milito, mi sukcesis, kun grupo de miaj samregimentanoj, reveni al Budapeŝto. Fininte niajn aferojn, ni decidis rigardi la lokojn, kie nia armeo batalis vintre.

Surborde, apud la Parlamento, ni sidiĝis en unu el la motorboatoj, naĝantaj konstante sur Danubo inter Peŝt kaj Buda.

La tago estis suna. Super Danubo flugis hirundoj, la riverego trankvile bluis sub la klara ĉielo. Ŝipoj de nia Danuba floto staris ĉe la kajo, ie ludis harmoniko . . . Neniu povis kredi, ke antaŭ kelkaj monatoj tiuj bordoj ankoraŭ vibris de kanonado, fendiĝis de infera pafado.

Surbordiĝinte ni direktiĝis supren laŭ mallarĝaj stratetoj, inter kaoso de detruitaj domoj. Estis malĝoje iri ĉi tie preter senfinaj elbrulintaj ruinoj, laŭtparolaj fremdlingvanoj, vidante neniun el la niaj. En Peŝt ni ĉiupaŝe renkontis gajajn samlandanojn, sed ĉi tie eĉ ne unu konatan kaskedon.

La ŝtonoj elspiris varmegon. Vidiĝis mizertruoj, kiujn la loĝantaro elhakis por si en la unutona griza amaso de ruinoj.

Tie ĉi ni fariĝis atestantoj de sceno certe ĝis nun memorata de ĉiu el miaj tiamaj vojaĝkunuloj.

Ĉe vojkruciĝo staris 13—14-jara knabo, ĉirkaŭata de amaso da hungaroj, vestita en soveta milit-uniformo kun epoletoj de vicserĝento sur la ŝultroj kaj kun brave maldekstren surmetita kaskedo.

— Rigardu! — gaje ekpuŝis min mia kamarado, — ankaŭ ĉi tie estas unu el la niaj . . . Jen kien li penetris!

La knabo estis okupita per vigla interparolo, kaj ne rimarkis nin tuj. Nigrahara, ruĝvanga, svelta kaj delikata kiel junulino, li rakontis libere kaj senĝene ion al hungaroj kaj el la amaso ĉiumomente eksonis jen ridekplodo, jen kriо de surprizo. Virinoj kun bebo surbrake, altkreska ŝuisto en labora antaŭtuko, hazardaj intelektulaspektaj pretertrairtoj surŝutis la knabon ĉiuflanke per demandoj. Sur la brusto de la knabo paradis signo de gvardio kaj medalo »por braveco«.

Nerimarkate de la juna gvardiano, ni haltis proksime, kaj, subpremante la ridetojn, ekaŭskultis.

La knabo, tute ne konfuzita de la hajlo da demandoj iel miksitaj el fragmentoj de diversaj lingvoj, respondis al la civiluloj kun trankvilo, digno kaj spriteco de sperta soldato. Foje li ĵetis ŝercon, foje li fariĝis tute serioza kaj grava. La loĝantoj tre interesiĝis, kiom aĝa li estas kaj kiel li trafis ĉi tien. Ili maltrankvilis, ĉu li hazarde ne perdis la vojon inter iliaj ruinoj, ĉu li ne bezonas helpon. Tiaokaze ili akompanus lin ĝis la komandanto.

— Mi jam estis ĉe la komandanto. Mi scias mem la vojon, — respondis la knabo konvinke. — Mi trapasis ja kun miaj fratoj la duonon de Eŭropo, kaj ĉu mi perdus la vojon ĉi tie? . . .

La hungaroj afable ridetis kaj videble ne tre emis kredi al la knabo.

— Kiel vi nomiĝas?

— Ivan. Vanĉjo.

Neniu sciis, ĉu tio estas fakto aŭ ŝerco, sed evidente plaĉis al la amaso, ke lia nomo estas Ivan.

— O, Ivan! . . . Haraŝo! Vanĉjo . . . Vi certe estas filo de generalo.

— Mi estas filo de la regimento . . . Mian patron ekzekutis la faŝistoj.

La virinoj kompate ekbruis, eksplikante unu al la alia la sencon de liaj vortoj. Tamen, al ili estis nekredeble, kiel oni povas esti regimentido.

— Ĉu vi estas regimenta tamburisto?

— Ne tamburisto, sed filo de la regimento. Soldato, — respondis fiere la knabo.

— Jesuo-Maria . . . Tiel malgranda kaj jam soldato . . . Kaj de kia nacio vi estas?

— Nu, klare de kia: de la soveta.

— O, la kamarado serĝento ŝercas . . . Ĉu ekzistas tia nacio? Ni demandas, kie vi naskiĝis.

— En Ukrainio. En Oĥtirka.

— O, Ukrainio! O, Oĥtirka! — ĝoje ekkriis la hungaroj. — Poltava, kozako, hopako . . .

Evidente per tio finiĝis ilia scio pri Ukrainio. Sed ŝajne li opiniis, ke tio tute ne sufiĉas. Do li komencis kompletigi:

— Ĉu vi aŭdis pri Taras Ŝevĉenko?

— Ni aŭdis, — respondis unu aŭ du.

— Ĉu pri ordeno de Bogdan Ĥmelnickij?

Silento.

— Kaj pri Dniepreljstan?

Silento.

— Eh, vi, Eŭropo! La elefanton vi ne rimarkis.

Poste oni lin demandis, kion li faros post la milito.

— Mi lernos.

— Li lernos, — tradukis unu al alia. — Kaj kiu pripagos? Patron ja vi ne havas . . .

La knabo levis la ŝultrojn. Kiel oni povas ne kompreni tion?

— La ŝtato pagos.

— Kaj kiu vestos vin.

— La ŝtato.

— Ho, la ŝta-to.

Ĉi tiu sceno elvokis en pluraj el ni multe-multe da pensoj pri la sorto de la multmiliona ukraina popolo kaj ĝiaj filoj. Kio estus antaŭe tiu ĉi junulo? Mi vidas lin ie sur fremda bieno kiel

AMA PARO

Kio kunpuŝis ilin? Mi ne scias,
ĉu la dezir, tentant eterna,
aŭ stas altiro krom la korpa sorĉo,
krom la ordono de l'instinktoj?

Kio pli estus? Ĉu la amindum?
»Sekretoj dolĉaj«, »vortoj ardiĝintaj«
defalas post la dezir-plenumiĝ,
se jam nudiĝis korpo kaj anim;
kiel forŝovas pladon satiĝinto,
tiel disgustiĝinto puŝas for
amaton enuatan.

Se estas pli, ĝi estas ke l'alia
stas konsortulo kaj ne il.
Ili sin nur konjektas, kvazaŭ time
palpas miraklojn novajn de ĉi amo,
ke tiuj el aeraj iĝu korpaj.

Trad.: János Tóth

GÁBOR RUDNAI

SOLECA CEDRO

Kiel do flugu, kiun la paseo
rekaptas per radik de kutimiĝoj?
Ĝermante en pase', futuron serĉas,
sed vane batas muron de l'silent,
kroĉi al kred, kunulo sin ne povas.
Vivanta kruc, pendingo propra vi stas
via solec tranĉila vin travundas
vin spert kolektiĝinta en jarringojn
humilkurbigas, lanta torturmorto,
ĝis vin, de viaj propraj febroj cindran,
lulas, dormigas kaj priploras
la velkintmama terpatrin.

PUTO DE MARIA EN NAZARETO

Ho lirla eterne sankta puto mirakla
verŝu molakve plena la kruĉan sinon apertan
vunde, se tuŝas gut via, jam la doloro saniĝas
lante la ringo de ond glatiĝante la koron atingas
softas ve se memor disĉesas drone en akvo

Trad.: K. Kalocsay

Tivadar Csontváry Kosztka (1858—1919) kreis sur sia aventura vivovojo esprimismajn pentrajojn de monumenta mezuro pri orientaj pejzajoj, kies vizie fascia mondo inspiris la junan poeton *Gábor Rudnai* je poemciklo. Ĉi-numere ni prezentas pentraj-parton de Csontváry kaj tri poemojn.



Csontváry: PUTO DE MARIA (PARTO)

---

paŝtisteton kun saketo, kun piedoj pikitaj ĝissange. Mi vidas lin kiel mizeran sekuriston ĉe la »siaj« aŭ ĉe fremdaj mastroj. Kiel Nikolĉjon el la rakonto de Teslenko, kun arda aspiro je studado, kaj trovanta la lernejpordojn fermitaj antaŭ si. Mi vidas lin kiel kotkovritan ministeton, helpvendiston en magazeno, junan kamplaboriston destinitan al ĉiama subpremo, malklereco kaj malfeliĉo.

Tiel estus antaŭe, iam.

Kaj jen li, filo de Soveta Ukrainio, staras sur la bordo de Danubo, parolas kiel plenaĝulo kun fremdlingvanoj kaj pacience eksplikas al ili, kio por li jam estas tute natura kaj komprenebla.

Poste ni interkonatiĝis.

Evidentiĝis, ke lia nomo vere estas Vanĉjo, ke li venis ĉi tien el Vieno kun grupo de kamaradoj, delegitaj de la regimento meti florkronon sur la komunan tombon de la kamaradoj pereintaj en la bataloj por Budapeŝto. Tie ĉi, sub obelisko, kontraŭ la Parlamento, kuŝis multaj gvardianoj el lia taĉmento . . . En la urbo la knabo iel devojiĝis de siaj samregimentanoj kaj nun devis memstare reveni al Vieno.

Ankaŭ ni mem maltrankvilis: vere, ĉu li ne perdis la vojon?

Sed la gvardiano nur ridetis:

— Ne timu, kamaradoj! . . . Mi sturmis Peŝton, tiun ĉi Budan mi liberigis . . . Ĉiu ŝtono ĉi tie estas al mi konata! . . .

El la ukraina:
Nadija Andrionova.

László Gyurkó

LENIN, OKTOBRO*

Gil, lia ŝoforo, skribas, ke Lenin, iam en 1921, eniris la barbirejon de Kremlo. Multaj estis tie, li sidiĝis, prenis gazeton el la poŝo kaj komencis legi. Kompreneble, oni volis lin lasi antaŭen. Lenin protestis: »Ne, ne, kamaradoj, mi dankas, oni devas sin teni al la vicordo. Ni nem ja difinas la ordon. Mi atendos, ĝis venos mia vico.«

Tiajn historiojn en nia jarcento oni disvastigas po dekduoj pri ĉiu gvidanto, kiu estis aŭ kiun oni deklaris granda. En la pasintaj tempoj la aŭtoritato de la reganto postulis, ke en siaj kutimoj, vivmaniero, ankaŭ en sia eksteraĵo ĝi diferencu de siaj subuloj. Al lia idoleco diodonita tiel same apartenis la krono, la juveloj, la palacoj, kiel la absoluta potenco, la rajto de glavo. La ŝtupoj kondukantaj al la trono simbolis tiun diferencon, kiu la reganton distingis de la simplaj homoj: la idolo ne povas havi homvizaĝon, ĉar kiel kun tia oni povus lin adori? . . .

. . . La retuŝadon mi abomenas ankaŭ sur portretoj, sed precipe en la historio. Tial min tuŝis komence malloge la historio de Gil. Neniel mi volus akuzi la bravan ŝoforon pri konscia falsaĵo, sed la legendo multfoje estas pli forta ol la realo kaj formas laŭ sia propra bildo ankaŭ la memoraĵojn. Sed Lenin, ju pli alten li leviĝis, despli obstine persistis pri tio, ke nenia privilegio al li tributiĝu. Kaj post la venko de la revolucio, ĉi lia vivprincipo fariĝis kvazaŭ fiksa ideo. Estis tial, ke longe li ne toleris apud si korpgardistojn. eĉ al la ŝoforo, sia sola akompananto, li malpermesis kunporti armilon. Estis tial, ke eĉ la plej malgrandan donacon li ne volis akcepti, kaj se li jam neniel povis de ĝi liberiĝi, li tuj sendis ĝin plu al iu hospitalo aŭ infanvartejo.

. . . Ke gvidanto de centmiliona ŝtato, mezmeze de plena postrevolucia konfuzo, havas konsciencriproĉon, ĉar malregule li pruntis libron el biblioteko, tio devigas nin rideti: tia pedanteco estas karakteriza pri manietaj scienculoj kabinetaj. Ke li, disipante sian tempon, skuiĝadis hejmen al Moskvo sur ŝarĝvagonaro, tio jam estas ĉagreniva. Sed ke li elmetas al risko ankaŭ sian vivon, tio estas facilanimeco proksima al senpripenseco. Kial li faris tion tamen? Li estis pudora homo, kiu abomenis ĉian eksteraĵan avantaĝon de la potenco, laŭ sia temperamento malamis ĉian esceptadon faratan pri li. Sed ankaŭ ĉi tio ne estas klarigo kontentiga; Lenin estis ĝisoste popolestro, kies privatan vivon influis la politikaj ideoj kaj konsideroj almenaŭ tiom same, kiel liaj karakter-donitaĵoj. Lia fiksa ideo estis ne nur protesto de pudora homo, sed ankaŭ trapensita programo de ŝtatestro. La ideo, kiun li volis triumfigi, klopodas liberigi la homojn disde la idoloj.

. . . Tial li devis surpreni ne nur tion, ke li portis trivitajn vestojn kaj nutris sin malbone, ke li rezignis pri ĉia eksteraĵa rezulto de sia enorma laboro, sed ankaŭ tion, ke li kontraŭrigardis la revolveron de Dora Kaplan. Apenaŭ kredeble, ke li ne scius, kion signifus lia morto al la revolucio, sed prefere li defiis ĉi tiun danĝeron, ol doni nutraĵon al la idolado.

. . . Li estis politikisto ĉiucole, kiu subordis sian tutan vivon, ĉiujn siajn sentojn al la laŭleĝaĵoj de la politiko. Sed la politiko por li signifis alion, ol la ĝenerala koncepto komprenas ĉi tiun nocion: ne nur taktikon kaj teorion, sed tian kunfandiĝon de teorio kaj praktiko, pri kiu apenaŭ troviĝas ekzemplo en la historio. Por li la filozofio estis ne nur ver-instrua scienco, sed ankaŭ metodo por elkono kaj elŝanĝo de la rusa realaĵo; ĝi estis mondkoncepto tiel trasorbiganta lian pensaron, ke ĝi influis ĉiun lian prijuĝon kaj agon. Unu el la plej raraj fenomenoj — kaj nun ankoraŭ kvazaŭ utopia — estas tio, kiam la du plej kontraŭaj bazaj tipoj, la pensanta homo kaj la aganta homo unuiĝas en tiu sama sola individuo sur la plej alta nivelo. Lenin la pensanta kaj la aganta ne estas divideblaj; sian vivkreaĵon, la revolucion, apenaŭ li povus

* Antaŭ cent jaroj, la 10-an aprilo 1870, naskiĝis Vladimir Iljiĉ LENIN. Okaze de ĉi tiu datreveno ni publikigas detalojn el libro de talenta juna hungara literatoro, el ties ĉapitro *Homo kaj revoluciulo*. La libro, sub la ĉi-supra titolo, vekis grandan rekonon kaj interesiĝon kaj aperis jam el du ldonoj (1967 kaj 1968).



efektivigi sen sia enorma teoria scio kaj certeco. Kaj samtempe, lia »politikeco« lin gardis de tio, ke li rigidiĝu en la teorio; li komprenis la »animon« de la marxismo, ke nome ĝi ne estas ĝisfinita instruo, sed tia pensosistemo, kiu estas konstante plukonstruebla; kiam li pensadis pri la ekzisto, li eliris ne nur el la Dialektiko de la Naturo, sed ankaŭ el la moderna fiziko; kiam li esploris la leĝojn de la kapitalismo, li lernis ne nur el La Kapitalo, sed ankaŭ el la plej novaj sociaj indikoj kaj statistikoj. En li enkorpiĝis la profetaĵo de Marx pri ĉi ties propra instruo: la Lenina vojo estas la efektiviĝinta filozofio. La filozofoj fiksas en libroj la malkovritajn tezojn; Lenin estis tia pensulo, kiu esprimis siajn agnoskojn pri la vero unuavice en la praktiko. La plej granda filozofia verko, kiun li postlasis al la postepoko, estas la revolucio.

. . . La sugestia povo de Trockij, la organiza kapablo de Stalin, la teoria riĉo de Buharin estas ĝenerale konataj. En la sortoturnaj horoj de la revolucio, Lenin, tamen, kalkulis unuavice ne je ili, sed je la dekmiloj da sennomaj revoluciuloj. La bazo de la Lenina politiko estas, ke li konstruis ĉiam sur ĉi tiu fortaĵo . . . Lenin eble per tio estis pleje distingita disde granda parto de siaj kunuloj, ke dum al ĉi tiuj la popolo estis celo aŭ rimedo, liberigenda amaso aŭ teorio-farita idolo, por li ĝi estis direktodetermina realaĵo, signalsistemo konstante priatentenda. Tion, ke en la decidaj problemoj li ne eraris, li dankis al sia senekzempla kono de la realo: li sciis koncepti decidon el la vero naskiĝinta en la instinktoj de dekmiloj.

. . . La antaŭensalta mentono plilongigita de barbo estas dura, sed ĝin moligas la serioza, medita rigardo: tiu homo min alrigardas, kiun liaj kunuloj nomis »oldulo« jam en lia junaĝo. Kaj tiu homo pensis ne en nombroj, sed en indikoj, en homoj.

Lin karakterizis la frunto, la mentono, la okuloj. La penso, la volo, la homeco.

. . . De jaroj oni min demandas ree kaj ree, kial mi skribas pri Lenin?

Mi fajfas pri la simpleco, min ne interesas, ĉu la ŝtatviroj portas frakon aŭ grizan jakon, kiompladan tagmanĝon ili amas: la valormezurilo de politikisto estas lia politiko. Ne la simpleco estis la esenco de Lenin, sed tio, ke li ekbriligis kaj enkorpigis eblaĵon, pri kiu la mondo ĝis tiam nur sonĝis: la eblaĵon vivi senmensoge, la eblaĵon elimini la ludon de rolo, la eblaĵon por la individuo elplenumiĝi sen misformiĝo. Por ke la homo povu fariĝi tio, kio li estas fakte: li mem. Por ke li povu fari sian taskon ankaŭ tiel, ke li ne devu dume surpreni rolon al si fremdan. Por ke eĉ tiu, kiu atingis plej alten, povu vivi laŭ la leĝoj de sia propra memo, kaj la okuloj de la mondo sur li fiksiĝintaj ne devigu lin malkonfesi sin mem.

Ke li nek tirano fariĝis, nek ekstravaganculo, sed ankaŭ la rolon al si fremdan li ne devis surpreni, tio cetere dependis ne nur de li, sed unuavice de la epoko, kiu lin ne devigis ludi rolon, ĉar tiel same ĝi fornegis la ŝajnon kiel Lenin. Ĝi ne estis paradiza epoko; ĝi estis la infero mem: centmiloj falis ja sur batalkampoj, milionoj mortis de malsato, dekmilionoj vivis en nekredebla mizero. Sed ĝi estis la epoko de la sincereco, kiu ne volis ŝajni alio ol ĝia esenco. Kaj jen kial ĉi tiu infera tempospaco estis la plej bela epoko de la homaro.

Trad.: *A. K.*

Gyula Ortutay

HUMANISMA ETNOGRAFIO

La okdekjara Hungara Etnografia Societo

La 27-an de oktobro 1889 tenis sian »formiĝantan kunvenon« unu el niaj plej malnovaj kaj signifaj sociosciencaj societoj: la Hungara Etnografia Societo. Nun ni festis do ĝian okdekan naskiĝtag-revenon, kaj mi estas konvinkiĝinta, ke la principoj determinantaj ĝian funkcion estas validaj ankaŭ en niaj tagoj, en nia nuna malfacila, ŝanĝiĝema mondo. Kaj certe estas inde konatiĝi kun la principoj de tia scienca korporacio, kiu, en nia rapidege ŝanĝiĝanta mondo, estas konstruita sur principoj daŭremaj, precipe en scienco tiel sentiva ideologie kiel la etnografio. La etnografion ja tiel facile oni akuzis per antihistoria perceptado, ĉar kelkaj parolis pri la »eterna« kamparana kulturo, pri la »senŝanĝa, praa« popolpoezio kaj pri aliaj el la sama speco; aŭ oni akuzis ĝin per nociva naciismo, nacia porinfluiteco — mi ne daŭrigas, gravaj akuzoj.

La Hungara Etnografia Societo estas teoria, metodologia kaj praktika: ĝiajn sciencopolitikajn principojn determinas parte la prezida enkonduko de Pál *Hunfalvy* kaj la festaj manifestiĝoj deklaritaj ĉe ĝia fondiĝo, parte la vivanta praktiko de 80 jaroj. Tre feliĉe, ke inter la solenaj deklaraĵoj, la spirito de la statuto kaj la ĉiutaga laboro de la hungara etnografio troviĝas nenia kontraŭdiro — kaj se en unu aŭ alia periodo montriĝis nocivaj fenomenoj (en la unuaj jaroj de la blanka teroro ĉirkaŭ 1920, poste dum la pezajtragikaj jaroj de 1942—44), ĉi tiuj estis esceptaĵoj. Licu al mi ellevi tiujn kelkajn ĉefpunktojn, kiuj estis kvazaŭ »gvido-stelo« en nia laboro.

Pál *Hunfalvy*, kiu estis ne nur eminenta konanto de la siaepoka etnografio, sed ankaŭ unu el la fondintoj de la kompara-historia direkto de la hungara lingvistiko, en sia prezida enkonduko emfazis kun speciala insisto tion, kio estis determina principo de lia tuta laborado: la pretendon pri historiografia metodo en la etnografia esplorado. Kiel lia enkonduko, ankaŭ nia statuto esprimas, ke la percepta metodo de la etnografia esploro estas la historia alirebligo, la ekzameno de la historiaj ŝanĝoj kaj evoluogradoj, la dialektika-historia perceptado, kiel nun ni tion nomas. Ni ne volas falsi la paseon je nia bildo: ne nia marxisma dialektiko estis ilia idealo, sed sufiĉe, se ni fikse konstatas, ke la ideo de la historia ŝanĝiĝado kaj de la evoluo estis ankaŭ ilia ideo, kaj ili kontraŭdirus ĉiun idealisman, metafizikan — do ĉiun antihistorian metodon; ili kredis je nenia senŝanĝa »eterna« kulturo aŭ kultura fenomeno.

La unua punkto de nia statuo klare, decide eldiris, ke la esplorado de la popoloj de l'tiama Hungario estas centra tasko, kaj, per la estigo de faksekcioj, emfazas ankaŭ tion, ke la esplorado de la ĉirkaŭaj popoloj helpas ankaŭ en la pli bona kompreno de la historio kaj kulturo de la hungara popolo. Eĉ, la unua paragrafo emfazas ankoraŭ, ke esploristoj de la hungara etnografio, ĝuste elirinte el la principo de la reciproka koniĝo, devas atingi, ke plifortiĝu »la sento de la frata interkonsento kaj interaparteno en la popoloj loĝantaj en la patrujo«. Ĉion ĉi oni deklaris tiam, kiam la nocivaj signoj de nacia orgojlo, nacia porinfluiteco kaj ŝovinismo montriĝis tutmonde, ankaŭ en nia lando. La hungara etnografio montris ankaŭ tiam bonan vojon per la emfazo de la justeco, de la reciproka respekto de gentaj valoroj, de la »frata sinteno«, kaj per la *statute fiksita devontigo je ĉi tio*. Nobla ekzemplo, kaj fiere ni povas diri, ke kontraŭ ĝi malofte pekis hungara esploristo, plie, ni povas mencii, ke ankaŭ Béla Bartók, giganto de la XX-jarcenta hungara muziko, laboris en tia sama spirito, kiam li faris siajn kolektojn kaj esplorojn de slovakaj, karpat-ukrainiaj, rumanaj, sudslavaj kantoj, kun la pretendo de scienculo, kontraŭante ĉian ŝovinismon. Pri la citita statut-paragrafo kaj pri la Bartók-a ekzemplodono ni estas fieraj, kaj rajte ni diras: se nur

ĉia esplorado konsentus en ĉi tio!

Fine ankoraŭ unu nomon: tiun de Mór Jókai, la plej sukcesa hungara romanverkisto de la deknaŭa-jarcenta romantiko. Li tre amis la etnografion, konfesis, ke la verkoj de Balázs Orbán kaj aliaj etnografiaj verkoj, kaj la vivo de la popolo mem, estas por li neelĉerpeblaj fontoj. Ankaŭ li eksplikis en nia fonda kunveno, ke la kulturon de la najbaraj popoloj ni devas esplori sen kontraŭinfluiteco, kun amika rigardo. Kaj tiam, kun subita turno, kaj kun sia entuziasma, kvazaŭ naiva optimismo, li diris jenon: »Se iam en la mondo realiĝos la eterna paco, tio rezultos el la ĝenerala disvastiĝo de la etnografia laborado«. Jen, la etnografion, la sciencon de la pli bona elkono de popoloj, ne ĉiu rigardis ŝovinisma, naciisma scienco. Jókai komprenis la veran humanan enhavon de nia scienco; ĉi tiu scienco estas vere »homcentre« humanisma. Kaj se ĝi servas la pli bonan komprenon de la popoloj, ĝi servas ankaŭ la pacon de la popoloj de la mondo. Kaj kiu ne scius el ni, kian pezon en la ombro de la nuklea armado havas la vorto — *mondpaco*. La sanktaj kaj naivaj vortoj de Jókai, el la distanco de okdek jaroj, fiksas antaŭ ni ĉi tiun vorton, kiel la plej ĉefan *politikan* enhavon de nia scienco. Ni ne subtaksu ĉi tiun »naivecon«: ĝi estas vorto vera kaj pura, eĉ se post du mondmilitoj kaj tiom da lokaj militoj ni prononcas ĝin angore. Nia trezoro pli kara ol ĉio estas la eblo de la homa futuro. Kaj la etnografio staras tie inter la porlaborantoj de la mondpaco. Ankaŭ pri ĉi tio ni memoris, kiam ni festis la 80-jaran datrevenon de la fondo de nia Societo.

Tr. *A. K.*

Kálmán Mikszáth:

La majstroj de signoj

Scienculo kabineta (okaze germana) prenis al si en la kapon, ke la homaron oni devus paroligi per signoj. Tuj ĉesus ĉiuj malfacilaĵoj de la lingvoinstruado, la popoloj kunfandiĝus — mallonge, la mondo havus el tio multege da profito.

Antaŭ ĉio do li ellaboris sistemon (ĉar ĉe scienculo, ĉu ne, la ĉefaĵo estas la sistemo), kaj decidis, ke por la perfektigo de tiu sistemo li vojaĝados por studi la movojn kaj gestojn de la diversaj popoloj.

En sia migro-migrado li venis hungaran vilaĝon, kaj tie oni diris al li, ke tie jam troviĝas scienculo eminenta en la parolo farata per signoj.

— Kiu do?

— Mihály Páva, la unuokula tajloro de peltmanteloj. Antaŭe li malsanadis je grava laringito, kaj tiam venis en lian kapon, ke domaĝe estas foruzadi la laringon, ĉar el tiu la homo ricevas nur unu solan por sia tuta vivo. Sed fingrojn li ricevas po kvin por ambaŭ siaj manoj. Li eltrovis do la paroladon per signoj.

Nu do, ekdeziris la scienculo viziti tiun tajloron kaj provi la praktikan valoron de la scienco de signoj. Nun ĝi montriĝos, nun ĝi estos unuafoje elprovita. Li petis la pastron konduki lin al la tajloro-scienculo.

Tiu ĉi ĝuste tiam ornamis per pasamento buntbroditan peltmantelon, kiam ili paŝis en la metiejon.

La scienculo alpaŝis lin kaj sekvis jena konversacio inter ili:

La scienculo levis unu fingron.

La tajloro levis fingrojn du.

Tiam la scienculo, kun vizaĝo brila de ĝojo, levis tri fingrojn.

La tajloro kunpremis ĉiujn kvin fingrojn kaj levis la pugnon.

La scienculo kontente palpebrumadis kaj foriris.

— Nu, ĉu vi do komprenis unu la alian? — demandis lia akompananto, kiam ili estis jam ekstere.

— Perfekte! — diris tiu entuziasme.

— Kiamaniere? Pri kio temis inter vi?

— Ni pridiskutis aferojn religiajn.

— Ha!

— Mi montris unu fingron, ke »unu estas Dio«, tiam li montris du, ke »Patro kaj Filo«. Bone, bone, sed se vi rigardas la aferon tiel, mi diris, tio estas mi montris, tiam Dio estas tri, »Patro, Filo kaj Spirito Sankta« kaj mi levis tri fingrojn. Je tio, li, kunpreminte la fingrojn en pugnon, esprimis, »sed ĉiuj tri estas tamen unu sola«. Ho, mi vin petas, grandioze prosperis la afero! Jen la vera mondlingvo! La »volapük« estas superata.*

La akompananto ŝancelis la kapon kaj post nelonge reiris sola al la tajloro.

— Nu, oĉjo Mihály, pri kio vi paroladis kun la scienculo?

— Tiu estas impertinenta persono, mia kara.

— Kial do?

— Envenas tiu mizerulo, en mian propran hejmon, kaj montras per unu fingro, ke mi havas nur unu okulon. Kio do? Li kuraĝas min moki pro mia kriplaĵo? Mi montras al li per du levitaj fingroj, ke tiu unu okulo valoras al mi pli, ol liaj du okuloj okulvitrumitaj. Sed la impertinenta mokadis plu, levis tri fingrojn por diri; »Ni duope havas tri okulojn«. Tiam ankaŭ mi ne povis plu toleri, kaptis min kolero, mi pugnigis mian manon . . . feliĉe al li, ke li ekspedis sin for.

. . . Tiel do estas, kiam du scienculoj komprenas unu la alian.

Kaj kiel povas esti, kiam ili ne komprenas sin reciproke.

Tradukis: *János Tóth*

* Laŭ la religioj kristanaj (krom la unitariana) ekzistas unu sola sed tripersona Dio.

Ádám Würtz



Li naskiĝis en Transdanubio en 1927. Sian diplomon li ricevis en 1953, en la Budapeŝta Altlernejo pri Figuraj Artoj, kiel lernanto de la majstroj Hincz, Bortnyik, Pór kaj Koffán. Li gajnis premiojn en landa konkurso, en la Viena junula mondrenkonto, en la Lejpciga libroarta ekspozicio kaj en la Lugana Internacia Grafika Bienalo. En 1957 kaj 1960 oni distingis lin per la Munkácsy-premio. Li estas sukcesa partoprenanto de enlandaj kaj eksterlandaj ekspozicioj, kaj unu el la elstaraj reprezentantoj de la moderna hungara libroilustrado. Nuntempe li laboras ankaŭ por svisa liberoeldonisto. Siajn 14 grandformatajn akvafortojn, pretigitajn al la tragedio Romeo kaj Julieta de Shakespeare, antaŭ nelonge li prezentis al la enlanda publiko. Pro niaj modestaj eblaĵoj, nur per unu libroilustraĵo kaj unu desegno ni prezentas al niaj legantoj la simpatian artiston de kolora individueco.

Corvina eldonos la Petőfi-poemaron

»Libero kaj Amo«, elektitaj poemoj de Sándor Petőfi, — la plej eminenta hungara lirikisto kaj elstara figuro ankaŭ de la mondliteraturo —, aperos en traduko de Kálmán Kalocsay en Esperanto.

Petőfi mortis antaŭ 120 jaroj, tamen lia poezio estas ankaŭ nuntempe freŝa kaj aktuala, liaj direndoj restos vivaj kaj efikaj por ĉiam. (Kredu tion al mi!) Petőfi estas bone konata ankaŭ de niaj eksterlandaj poeziamantoj. Multaj poemoj de Petőfi aperis en Hungara Antologio ktp. La ĉarma popolfabelo »Johano la brava« presiĝis jam en tri eldonoj. Ni ne troigas, kiam ni asertas, ke la eldono de la poemaro de Petőfi estos grava evento ne nur de la Esperanta literaturo, sed ankaŭ de la internacia movado. — En kelkaj landoj pliiĝas la interesiĝo por nia poeto. Ekz. en la malgranda Estonio oni jam antaŭmendis 200 ekzemplerojn. Estas salutinde, ke la antaŭparolon verkis Kalocsay mem, do li donacis al ni la detalan historion de la vivovojo de Petőfi, krome konfesojn pri la zorgoj kaj »sekretoj« de la tradukarto. La eldonon helpas — krom Hungara Esperanto-Asocio — ankaŭ la Instituto de Kulturaj Interrilatoj. La eldonisto estas la fama Eldonejo Corvina, kiu en 1966 eldonis i. a. ankaŭ la »Tragedion de l'homo« de Madách. — Ni estu konsciaj pri tio, ke almenaŭ en la nuna tempo la literaturo estas unu el niaj fortaj kolonoj. Mia ĝojokrio pro la Petőfi-eldono miksiĝas kun la afabla, sed decida deziro: niaj kolegoj en ĉiu lando atentu pri tio, ke Corvina decidis eldoni ĉiujare unu gravan Esperantan libron. Do ni preparu nin, pretigu ankaŭ nian monujon (la prezo de la poemaro estos nur ĉ. 30 forintoj), kaj nur de ni mem dependas, ke Corvina daŭrigu la eldonon de niaj libroj. Kaj ni ne forgesu, ke nur per sinofero kaj entuziasmo ni povos atingi ion grandan, ion grandiozan.

Preskaŭ spirretene ni atendas la tempon, kiam — post ĉ. 8—10 monatoj — ni povos ĝui la legadon de ĉ. 140 poemoj de Sándor Petőfi, el la pli longaj la »Johano la Brava« kaj partojn el la »Apostolo«.

L. Kökény

La unua hungara universitato funkciis de 1376 ĝis 1526

Novaj indikoj, dokumentoj malkovriĝis pri la historio de la unua hungara universitato fondita de reĝo Ludoviko la Granda *(Nagy Lajos)* en *Pécs*. Tiuj faktoj pruvas, ke la malnova *»alma mater«* kontinue funkciis ĝis la katastrofa batalo ĉe urbo *Mohács* (Mohaĉ) en la jaro 1526, kiam la turka armeo venkis la hungaran. Tiu institucio estis unu el la plej unuaj universitatoj de Eŭropo (ĝin antaŭis nur tiuj de Parizo, *Bologna*, Prago, Krakovo, Vieno). Ĝia disradiado efikis al tuta Hungario, kaj ankaŭ al la Balkanaj ŝtatoj. Surbaze de pli fruaj esploroj la historiistoj opiniis, ke la universitato inaŭgurita en 1367 daŭris nur dum kelkaj jardekoj.

ILUSTRACIO DE ÁDÁM WÜRTZ

Intervjuo kun Lajos Kökény

Mi serĉis okazon paroli kun L. Kökény, eksredaktoro de H. V., demandi lin pri H. V., tiama kaj nuna, kaj, ĉar li ne lasis pri si paroli en la liaredakta H. V., ankaŭ pri li mem. Unue mi demandis lin, kiel kaj kiam li fariĝis fervorulo de E-o.

— En 1919, dum la Konsilia Respubliko, mi estis »filozofo«, t. e. univ. studento de la pedagogia fakultato, inter tre agrablaj cirkonstancoj: la Kultura Komisario vartis nin sur la Margaret-insulo de la ĉefurbo en bela turhava domo, antaŭe destinita por hazardluda kazino. En tiu kolegio ni ricevis loĝon-manĝon tre malkare, tiel ke el la stipendio restis ankaŭ poŝmono. Multaj, kun kiuj mi tie kunestis, fariĝis poste famekonataj: mi menciu nur *Zoltán Fábry*, nun loĝantan en la Slovakia Ŝtos, la grandan humaniston-antifaŝiston (la lasta hungara numero de *Paco* publikigis pri li ampleksan artikolon). Kara amiko, *Sándor Hallgató*, agitis tie por E-o kaj gvidis kurson de mi partoprenatan. Tie loĝis kelktempe ankaŭ Lajos *Kőnig-Király*, poste dum jardekoj motoro de la E-a movado en Miskolc, kaj, en 1922—23, mia pluinstruanto E-a.

— Kaj post la falo de la Konsilia Respubliko? Ĉu vi ne havis malagrablaĵojn?

— Ne tro, kompare al la sanga teroro de la blankuloj. Kiel ĉefkonfidenculon kolegian kaj sindikatan, oni, por puntempo, eksigis min el la universitato. Mi do migris al Miskolc kaj trovis tie laboron kiel vicinstruisto en komerclernejo, studis por mia fermekzameno kaj akiris la diplomon en 1924. En Miskolc vekiĝis en mi ĵurnalista ambicio, sed kelkajn miajn artikolojn supre oni trovis »renversemaj« kaj tion al mi sciigis ankaŭ oficiale. Tiam, vidante ke en Miskolc ne kreskos por mi laŭroj, mi ĝin adiaŭis, kaj, granda feliĉo, en Budapeŝto mi sukcesis fariĝi stenografo parlamenta. Kiel tia mi laboris ĝis 1950.

— Kaj tie vi komencis aktivi por E-o, ĉu ne?

— Jes, tie. Mi redaktis kvin jarojn de Hungara Heroldo (1928—1930; 1935—1936), tri E-ajn Jarlibrojn hungarlingve (1930—1932), adaptis la hungaran stenografian sistemon al E-o, aranĝis kun *F. Szilágyi* kaj *K. Bodó* E-ajn literaturajn vesperojn en la E-a Societo, kaj helpe de la »Literatura Societo *Lafontaine*«, tiam prezidata de *Béla Vikár*, ankaŭ en la salonego de la Muzikakademio. — Post la liberiĝo, mi varbis simpatiantojn de E-o inter la parlamentanoj kaj atingis, ke en enketo pri la lerneja instruado de E-o 102 el ili respondis favore, eĉ la lingvisto *M. Rubinyi*, kiu 40 jarojn antaŭe aperigis tre E-malamikan artikolon en akademia revuo. Post la unuiĝo de HES kaj HESL mi elektiĝis kunprezidanto de la unio.

— Aktiveco vere larĝa kaj fruktodona kaj vi skizis ĝin tre lozkonture. Ekz-e vi tute forgesis pri Enciklopedio de Esperanto.

— Nu jes, ĝi kostis al mi tri jarojn da redakta laboro. Kio vin interesus ĉi-koncerne?

— Mi vidas tiom da demandoj en miaj notoj, ke tio postulas pri tiu grava, preskaŭ mi dirus »providenca« laboro apartan intervjuon. Sed oni vin konas ankaŭ kiel grandan amanton de la Oka Kvartalo Budapeŝta.

— Mi estas amanto de la tuta Budapeŝto. Ekde 1930, oni aranĝis en la ĉefurbo urbvizitajn promenadojn kaj mi partoprenis tiujn. Feliĉe, nian grupon gvidis kelkfoje *Lajos Hatvany*, literatoro kaj Petőfi-esploranto, kaj li, kaj aliaj, prezentis tiel ekscite la urbajn interesaĵojn, ke mi decidis fariĝi budapeŝtologo. Fakte, mi kolektis pri Budapeŝto bibliotekon da 600 volumoj, sed poste trovis la urbon tro granda por unu homo kaj restriktiĝis je mia loĝkvartalo, la Oka.

— Mi vidis en la televido la kvizan vetludon inter la Budapeŝtaj kvartaloj kaj admiris viajn respondojn je kelkaj demandoj diable implikitaj. Via kvartalo gajnis eble dank' al vi.

— Tute ne. Niaj kvartalologoj estis bonege preparitaj. Eble mi helpis per tio, ke la 500-paĝa manuskripto de mia libro pri la Oka Kvartalo troviĝas en la Ĉefurba Biblioteko Ervin Szabó kaj tie troveblas multaj indikoj necesaj ĉe tia kvizo.

— Kaj kio do pri via granda laboro plenumata en la okjara redakto de H. V.

— Tiu tempo estas tro freŝa, por ke mi povu pri ĝi paroli objektive.

— Mi konas vin kiel objektivegulon. Tamen, ne koleru, mi miris aŭdi de kelkaj pri via koleremo.

— Ne, ne, kolerema mi vere ne estas, nur enflamiĝema kun flamo baldaŭ forflagranta. Ĉio neĝusta aŭ nejusta min enflamigas. Jam kiel junulo mi pagis ties koston: oni preskaŭ eksigis min el la gimnazio, ĉar profesoran maljuston mi rifuzis laŭte kaj ruĝvizaĝe. Mi scias ja la saĝon: kalkulu ĝis dek antaŭ ekparoli, sed ŝajnas, ke ĉi-koncerne por mi estas tro granda la paŝo inter la teorio kaj la praktiko.

— Nu, kalkulu ĝis dek kaj diru vian opinion pri H. V.

— Redaktante, mi lernis, ke oni devas lerni la redaktadon, kaj mi klopodis lerni, marŝi kune kun la tempo, konigi, konforme al la gazetprofilo, nian landon, sed flegi ankaŭ la internacian spiriton, donante gastlokon al alilandanoj.

— Kaj kiel plačas al vi la nuna H. V.?

— Mi ĝojas pri ĝia vigleco kaj ĝenerale aprobas la redaktadon. Kompreneble ekzistas problemoj: ekz-e, mi opinias, ke en la revuo oni ne diskutu pri demandoj de e-ismo, ĉar tio produktos tro da malplena teksto. Pri la »moderneco« mi pensas, ke necesas toleremo kaj de la redaktoroj (ne tro aŭdace) kaj de la leganto (pli kompreneme, ĉar eble la difekto, kiel ĉe la televido, troviĝas ne en la dissendo, sed en la aparatoj).

— Tio estas, en la kapo de la legantoj?

— Tion diras vi. Mi esprimis min pli ĝentile.

— Kaj mi deziras al vi, nun redaktor-kunlaboranto kaj freŝiganto de Hungara Esperantisto, longe-trelonge, freŝan forton de juna veterano.

— Dankon.

K. K.

NI EKSPORTAS KAJ IMPORTAS

maŝinojn, instalaĵojn, kompletajn fabrikojn
por kemiaj kaj farmaciaj industrioj,
por nafto- kaj gas-industrioj
kompletajn kaj opajn instalaĵojn,
plastofabrikojn, farbofabrikojn,
instalaĵojn por galvanoplastiko,

NI ENTREPRENAS:

projektadon de aluminio-fabrikoj
kaj aluminiofornoj, liveron de ties
maŝinistalaĵoj, kaj allige geologian
esploradon kaj minej-projektadon
por baŭksito.

CHEMOKOMPLEX
BUDAPEST - HUNGARY

Hungara Eksterkomerca Entrepreno

Pri Maŝinoj kaj Instalaĵoj Por La Kemia Industrio.
Budapest, VI., Népköztársaság utja 64.

Poŝta adreso: Budapest 62. poŝtfako 141. ● Telefono: 316—720, 116—470 ●
Telegramoj: CHEMOKOMPLEX, Budapest. ● Telekso: Budapest 264.

Nur por virinoj

Je la festo de la internacia virina movado

La II-a Internacia Socialista Virina Konferenco en 1910 en Kopenhago akceptis la proponon de la elstara batalanto de la laborista movado, Clara Zetkin: en ĉiu jaro la 8-a de marto estu dediĉita bataltago por la socia, ekonomia kaj familia egalrajto de la virinoj. De tiam dise en la mondo la adeptoj de la homa progreso festas tiun tagon.

Al la ĉi-jara, 60-a datreveno en Hungario donas apartan signifon, ke antaŭ 25 jaroj fondiĝis la Hungara Demokratia Virina Ligo (hodiaŭ: Tutlanda Konsilio de la Hungaraj Virinoj), kies ĉefa programo en la unuaj jaroj estis: helpi la resanigon de la vundoj, kiujn kaŭzis la dua mondmilito. Post la rekonstruo de la lando antaŭ la virina movado staris nova tasko: batali por la egalrajteco de la virinoj. Tiu ĉi povis realiĝi kune kun la kreo de la popola potenco.

La rondcifera datreveno instigas nin fari kalkulon. Estas ĝojiga sento priskribi — eĉ se mallonge — la rezultojn: la virinoj fariĝis samrangaj ŝtatanoj kiel la viroj. Sur la tereno de la laboro, lernado kaj publika vivo estas certigata por ili la egalrajteco. Hodiaŭ jam 25 procentoj de la diplomitaj personoj estas virinoj. Troviĝas inter ili ministro, fabrikdirektoro, ĉefkuracisto, scienculo, deputito kaj aliaj altrangaj respondaj funkciuloj. Diversaj leĝoj zorgas pri la protektado de la virinoj kaj patrinoj. La hungara virina movado ne unufoje aŭdigas sian voĉon ankaŭ en internacia forumo por la paco.

Tiom pri la rajtoj kaj ebloj.

Sed estus eraro supozi, ke la virina movado en Hungario jam plenumis sian tutan programon kaj en la estonto ĝia agado povos malpliiĝi. Ne estas tiel. Grava kaj komplika tasko atendas nun solvon: transformi la socian konscion, krei tutlande tian etoson, en kiu vaste estas efektivigeblaj la preskriboj de la leĝo.

Nuntempe ankoraŭ ekzistas parto de publika opinio, kiu estas plena de antaŭjuĝoj — heredataj de la feŭdalismo — kaj obstine persistas ĉe la konservativa mondkoncepto, kiu dum longaj jarcentoj funde radikis en la sinsekvaj generacioj: rilate la menson, la virino estas kvazaŭ neplenaĝa infano, tia estaĵo, kiu estas destinita por fari nur duarangan laboron kaj servi la familion. Bedaŭrinde ofte sperteblas, ke la virinoj mem konsentas tiun opinion. — Foje samideanino diris al mi: »Metu la manon sur la koron kaj diru sincere: kiu helpas vin verki artikolojn?« — Nu mi nun konfesas: neniu!

Estas bezonata ankoraŭ pli longa tempo, ke per la forto de la faktoj oni sukcesu konvinki ĉiun: la pli granda parto de la homaro estas samranga persono kiel la viro kaj la homan valoron ne povas decidi nur la sekso.

La internacia virina movado fiksis antaŭ sin la ideon: ne troviĝu virino en la terglobo, kiu dirus, kion unu el la virinaj figuroj de la belega dramo de García Lorca konceptis jene: Naskiĝi virino estas la plej granda plago de Dio.

Ada Csiszár

Jen kiaj ni estas! (?)

1. Virino havas haron longan kaj saĝon mallongan.
2. Virino scias — tuta mondo scias.
3. Edzin' admirata — edzo malsata.
4. Virina lango buĉas sen sango.
5. Se edzino ordonas, domo ordon ne konas.
6. Ne ekzistas savo kontraŭ malbona virino.
7. Edzino pli elversas per funelo, ol edzo enversas per sitelo.
8. La plej danĝera homo — malbona in' en domo.
9. Inter fremdaj ŝi estas edzino-anĝelo, kun la edzo ŝi estas demono kruela.
10. Virina ploro sen valoro.
11. Virina rideto pli kaptas ol reto.
12. Virino kolera pli ol hundo danĝera.
13. Kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas.
14. Virino bonorda estas muta kaj surda.
15. Virino batas per lango — aperas vundo plej sanga.
16. Larmo virina baldaŭ sekiĝas.
17. Malbona virino diablon superas.
18. Kie regas virino, malbona estas la fino.

(El Proverbaro Esperanta kunmetis)

— *eta* —

Antikomentoj

1. Da haroj neniom montras genion?
2. Edzo ne scias, tuta mondo scias.
3. Edzo admirata, pli juna edzin' dezirata.
4. Ankaŭ Jago honesta estis vir' virinvesta.
5. Edzo, ne edzino ordonas, salajron por vino fordonas.
6. Ĉu al viro saĝo mankas aŭ kuraĝo?
7. Ne ekzistas kartludulo, nek drinkulo, nek zeloto de ĉevalvetkuro?
8. Vidu reĝon Sahriar en »1001 Noktoj« kaj lian modestan disĉiplon, Henrikon VIII.
9. Kun lupo hurlu lupe?
10. Tiel senkompataj la viroj?
11. Tiel avidas la fiŝeto?
12. Virin' kun kareso flata pli ol kato delikata.
13. Kie anĝelo ne povas, tien viron li ŝovas?
14. Belega vira revo: al virino tolero kaj devo.

15—16. Virino sen lango kaj larmo estas sen armo.

17. Malbona viro anĝelon superas?
18. L'etern-Virina nin Levas al alt' (Fausto II.).

Phil *O'Gyn*

La plej belaj vortoj

En la hungara gazeto »Nord-Hungario« aperis artikolo ĉi-tema, rakontanta, ke okazis luda esplorado de ĉi tiu temo fare de poetoj, aktoroj, estetoj, eĉ sub kontrolo de hungare ne sciantaj fremdlandanoj. Venkis tiaj vortoj kiel (kun E-a ortografio) *sellő, ŝellő, liliom, illat, ĉillan*. Tio min memorigas pri iama artikolo de nia poeto *Kosztolányi;* ĉi tiu konigis en sia verkaĵeto, ke *Paul Valéry*, la grandfama franca poeto, juĝis plej belaj la jenajn francajn vortojn: *pure, jour, or, lac, pic, seul, onde, feuille, mouille, flute*. Legate, ĉi tiu listo, fakte, sonas kvazaŭ poemo, sed Valéry certe estis influita ankaŭ de la senco de la vortoj: en E-o, ekzemple, *pik'* estus elektita de neniu, ĉar ĝi ne havas la sencon »kabo« kiel en la franca.

Koncerne E-on, mi premius la vortojn *balzamo, ĉarma, lamento, lampiro, larmo, luli, mielo, svelta, veluro, vualo*, allasante tamen, ke aliaj eble rajte premius aliajn, kaj ke ankaŭ min influis la vortosenco, ĉar mi ne elektus la vortojn *malsano, ĉarniro, alimento, vampiro, alarmo, lolo, muelo, velka, sulfuro, zuavo*, kvankam sone ĉi tiuj ne multe diferencas de tiuj. Nekonanto de la lingvo tamen povus elekti ĝuste ilin: *Kosztolányi* skribas, ke al portugala knabo pleje plaĉis la hungara vorto *dugóhúzó*, dio scias pro kiaj asociacioj. Hungaro certe ne elektus ĝin pro ĝia senco (korktirilo).

Aliflanke, oni povus elekti ankaŭ ne laŭ la kriterio de la absoluta sonbeleco, sed laŭ tio, kiuj vortoj esprimas pleje sian sencon per sia sono. Laŭ tia prijuĝo *torturo, mordi, murdi, tordi, fulmotondro, kraĉi, aĉa, plonĝi, kraki, vipuro* estus ekz-e premieblaj; kaj *vipuro* certe forgajnus la premion rivale kun *vipero*, kiu multe malpli esprimas la malicon kaj insidon ol la »preserara« vorto. La malavantaĝo de *mal*, por poetoj, estas ĝia moleco; tial *malkonkordo, malbela, malmola, mallaŭdi* esprimas per sia sono sian kontraŭon, tentante la poetojn anstataŭigi ilin per *diskordo, turpa, dura, skoldi*, eĉ *vituperi*, ĉar ankaŭ *skoldi*, kvankam ĝi komenciĝas atake per sia *sk*, moliĝas en la fino.

Sed ankaŭ tre agrablaj vortoj troviĝas inter la t. n. neologismoj: *delico, filandro, friska, kantileno, lanta, linda, lirli, lontana, suspiro, svaga*. Iliajn ekuzintojn, nepre kaj inde kondamnindajn, almenaŭ ĉi-koncerne do ne povas trafi riproĉo.

K. K.

L. TÁRKONY

HAŬTŜANĜO

Kiel printempe la serpento
la haŭton enuan,
tiel mi deĵetas kun facila sento
ĉiun ŝarĝon gluan.

Oldaj doloroj rusta-lancaj
kaj zorgoj nazotorde rancaj,
hobie vartataj kolektoj
de memoroj subpolvaj,
de ŝimbarbaj objektoj,
de problemoj eterne sensolvaj,
kaj ĉio teda, nana kaj mucida,
vi min plu ne ligas,
mi vin faligas
kun membrostreĉo rida!

Kaj se bruligis mian bibliotekon bombo,
ĉu en mi ne pluvivos miaj libroj amataj?
Kantante mi foriras de ilia tombo.

Ja restas por nerabebla havaĵo
printempoj sankta-promesaj,
silento de pura aŭtuna pejzaĝo,
rideto de rigardo-rava vizaĝo.
kelkaj taktoj ĉiele karesaj,
kelkaj sunhelaj horoj sinforgesaj,
kun lontanen loganta miraĝo.

Kiel ajn fie
min traktis la sorto,
mi diras defie:
Omnia mea mecum porto.

(1945)

REVUO DE REVUOJ

Ni, kiel kvaronjara gazeto, ne povas vetkuri kun la vigla duonmonata *Heroldo de Esperanto*, tial ni okupiĝas nur pri tiuj ĝiaj artikoloj, kiuj al ni ŝajnas sendependaj de la tempopaso. Kiel tian ni salutas la noton de d-ro *B. Nednov* pri la superflua uzo de »ge«, ekzemple »geesperantista societo«. Same ni sentas superfluaj la prefikson en »gekolegoj«, »geaŭskultantoj«, »gesamideanoj«, »gesinjoroj«. Se iu volas speciale insisti, ke li parolas al »geseksa« publiko, li pripensu, ke la ĝentileco ne ŝparas pri la alparolo kaj diru ekzemple: Karaj kamaradinoj kaj kamaradoj. — En la sama numero (n-ro 15. 1969) ni legis la artikolon de *A. Lienhardt* pledanta por Esperanto simpla. Li skribas multon valoran, ekzemple malaprobas la malklarajn aŭ pezajn vortkunmetojn, admonas pri ĝusta kaj neŝpara uzo de komoj kaj dividstrekoj. Tamen ni ne povas konsenti lin en ĉio. Laŭ nia opinio fari Esperanton simplega signifus ĝin degradi. Malkara ne estas kara. E-o estas simpla, sed nur kiom lingvo povas esti simpla, ĉar ĝi devas ja esti kapabla interpreti komplikajn sciencajn artikolojn, diversmaniere implikitajn stilojn de diversaj beletraj aŭtoroj. Neniel estas imageble, ke ĉion ĉi oni senmanke kaj eĉ facile komprenu post la tralerno de kurso. Tiu kursgvidanto, kiu promesas tion al siaj lernantoj, simple mistifikas ilin, kaj ne estas mirige, se tiuj lernantoj poste seniluziiĝos. Je la demando, ĉu Esperanto estas facila, estas konsilinde diri: Dependas de tio, por kio vi uzas ĝin, ĉu por »facile interkompreniĝi en la tuta mondo«, kiel Lienhardt postulas, aŭ legi sciencajn verkojn, klasikajn dramojn, modernajn poemojn, aŭ mem traduki, eble originale fari tiajn. Jen estas *tri ŝtupoj*, eĉ iom krutaj ŝtupoj, kaj verŝajne pli kaj pli krutaj kun la evoluo de la lingvo kaj de ĝia literaturo scienca kaj beletra. Sed eĉ la plej ekstrema kruteco de la dua kaj tria ŝtupoj ne faras pli malfacila la atingon de la unua ŝtupo. Ni ne povas akcepti kelkajn liajn plifaciligajn proponojn. Precipe la devigan rigidigon de la vortordo »subjekto-verbo-komplemento« kaj la grandan striktigon de la uzo de la akuzativo. La akuzativo ja neniam prezentas problemon de kompreno, maksimume problemon de uzo. Krome, tio ke akuzativo estas uzebla preskaŭ ĉiam anstataŭ prepozicio, estas unu el la geniaj trovaĵoj de Zamenhof, kiel granda sintaksa faciligo. La aŭtoro mem sentas, ke ne estas tre facile seninterrompe respekti liajn postulaĵojn kaj tial li pledas por kreo de landaj lingvaj komitatoj kontroladi manuskriptojn. Tiu propono principe estas certe aprobinda, sed havas du tuberojn: unue, anstataŭ landaj komitatoj pli taŭgus internaciaj, ĉar samlandanoj ne elsarkos nepre la sialingvajn idiotismojn; due, tiuj komitatoj devus esti liberaj de certaj difektoj obstinaj (ekzemple »tiom-kiom-malsano«). La aŭtoro artikolfine citas de Zamenhof la admonon konservi al la lingvo ĝian simplecon kaj facilecon. Sed Zamenhof postulis tion nur por la »unua ŝtupo«, t. e. por la ĉiutaga lingvo. Pri la literatura lingvo li havis tute malan opinion. Li postulis adekvatajn tradukojn de gravaj, do ofte stile malfacilaj verkoj, por ke la lingvo riĉiĝu kaj disvolviĝu (vidu Lingvaj Respondoj, Marmande, 1962: 150 §). Nur kelkajn vortojn ankoraŭ. Eble oni ne povas paroli pri malaltaj soci-tavoloj *ĉiulandaj*. Almenaŭ ĉe ni, la juna generacio, kun tre malmultaj esceptoj, jam havas sian ok-dekdujaran lernejan instruitecon kaj plimalpli bone lernis jam unu fremdan lingvon.

La oktobra numero de *Sennaciulo* publikigas protokolon pri la 42-a kongreso de SAT en Novi Sad. Interesaĵoj de la laborkunsidoj estis raporto pri la eldono de Plena Ilustrita Vortaro, en kiu oni havas klopodojn jam nur pri la ilustraĵoj, kaj la alparolo de *Jeneckov*, kiu pledis »krei unuecan mondan Esperantan organizon, en kiu ĉiuj . . . E-organizoj devus trovi komunan intereson«. Ĉu en tia unuiĝo SAT ne perdiĝus pro ĝia manko de ideologia bazo? Salutinda estas la artikolo de *Stefano Huszár*, kiu parolas pri la problemoj de la socia revolucio klare kaj saĝe. Fine kelka marksisma lumo en la ideologia nebulo de la gazeto.

Esperanto-Gazeto, organo de IOE, publikigas interesan artikolon pri la »seksa revolucio«, garnitan per bildo de alloga nudo. Ni serĉis en la gazeto artikolojn pri la funkcio de IOE, ĉar ni tre volonte citus el ĝi utilajn rimedojn por militantaj esperantistoj. Eble en la proksima numero ni trovos tian.

Komuna Esperanto-Gazeto montriĝas utila lingvo-instruilo per siaj rubrikoj »Esploru vian scion« kaj »Esperanto en la ĉiutaga vivo«, imitindaj en naciaj E-gazetoj. Multajn interesaĵojn enhavas ankaŭ la daŭrigata »Lingvo estas socia spegulo« de *F. Aarse*. Male en »Rigidiĝo de verbaj modoj« *H. Kruijt* montras strangan manieron de diskuto. Li citas el Plena Gramatiko, ke »la gramatika logiko nekontesteble pledas por kondicionalo post *kvazaŭ*«, poste li skribas, ke pri la gramatika logiko li ne volas nun diskuti. Nu, el P. G. ni konstatis la superfluecon de tia diskuto, ĉar tie post la supra citaĵo staras »Nome« kaj tiu »Nome« enkondukas fakte nekontesteblan pruvon pri la neceseco de la kondicionalo. *H. Kuijt* ŝajne ne kutimas legi tion, kion li ne povas refuti. Kaj ni suspektas, ke estas li, kiu, recenzante gravan gramatikan verkon (Sennaciulo), longe kaj larĝe eksplikis, ke li ne legis la verkon kaj eĉ tre fieris pri tio. Se mi eraras pri la identeco, mi petas pardonon.

Pri la valora artikolo de *Emilia Lapenna* en *Norda Prismo*, en kiu temas pri la problemo de libroeldonado, ni volas skribi pli, ol pri kiom da loko nun ni disponas.

L. *Tárkony*.

AKVO-ESPLORO
AKVO-ELTERIGO
AKVO-REZERVADO
AKVO-PURIGADO

PRI AKVO-PROBLEMOJ STARAS JE VIA DISPONO

NIKEX, HUNGARA EKSTERKOMERCA ENTREPRENO PRI PRODUKTAĴOJ DE PEZA INDUSTRIO
BUDAPEST, V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6., BUDAPEST 5. PF. 128. TELEGRAMOJ: NIKEXPORT BUDAPEST.

NIKEX, HUNGARIAN TRADING COMPANY FOR PRODUCTS OF HEAVY INDUSTRY
BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6. P.O.B. 128. BUDAPEST 5. CABLES: NIKEXPORT

NIKEX UNGARISCHES AUSSENHANDELSUNTERNEHMEN FÜR DIE ERZEUGNISSE DER SCHWERINDUSTRIE
BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6. BUDAPEST 5. POSTFACH 128. TELEGRAMME: NIKEXPORT

NIKEX SOCIÉTÉ HONGROISE POUR LE COMMERCE DES PRODUITS DE L'INDUSTRIE LOURDE
BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6. BUDAPEST 5. B. P. 128. TÉLÉGRAMMES: NIKEXPORT BUDAPEST

László Feleki

FAMAJ HOMOJ

(Detaloj)

La homo kaj la besto diferencas pleje en tio, ke la homo volas fariĝi fama, la besto ne. Ankaŭ la besto strebas je daŭrviveco, sed nur pere de siaj posteuloj. Je persona gloro ĝi ne sopiras. Kontraŭe la homa estaĵo strebas je konateco, gloro, mondfamo, senmorteco.

Nun jam estas preskaŭ neeble teni en la kapo ĉiujn famajn individuojn de la jarmiloj. Tiu ĉi modesta verketo servas ĝuste por tio, ke per sia kurteco ĝi donu rapidan helpon al la kulturita legantaro, kaj kvazaŭ en nuksoŝelo ĝi resumu tiujn plej gravajn karakterajtojn, kiujn decas scii pri la famaj homoj.

AISCHYLOS. Li estis pli potenca titano, ol tiuj, pri kiuj li verkis.

ANAKREONO. Per lerta temelekto li certigis sian senmortecon: li kantis pri amo kaj vino.

ARKIMEDO. La unua, sed ne la lasta scienculo, kies cirklojn oni perturbis.

BABEL, Isak. Granda soveta verkisto, ne ricevinta Stalin-premion.

BALZAC, Honoré de. Li volis superi Napoleonon, kaj sukcesis, ĉar sendube li verkis pli bone.

BARABASO. Li dankis sian vivon al tio, ke li estis nur rab-murdisto kaj ne novkredulo.

BARTÓK, Béla. Ne li estas responsa pri tio, kion li esprimis per sia muziko.

BAUDELAIRE, Charles. Ankaŭ nun freŝaŝ la floroj de l'malbono.

BISMARK, Otto von, princo. Li sukcesis unuigi ne nur Germanion, sed ankaŭ la mondon kontraŭ Germanio.

BREUGHEL, Pieter. Liaj bildoj figuras la animajn kaj korpajn funkciojn de la homo, simbolante, ke la homo sopiras al la infinito kaj al bona digesto.

CALIGULA, Gaius Caesar. Li mortis per la natura morto de la despotoj: mortbatite.

CASANOVA, Giacomo. En sia olda aĝo akre li persekutis tiujn malmoralaĵojn, por kiuj li jam ne estis kapabla.

CELSIUS, Anders. Lia nomo restos, ĝis malvarmiĝos la Tero.

CERVANTES, Miguel de Saavedra. Per sia Donkiĥoto li instruas la homojn pri tio, ke oni devas batali, ĉar ne ekzistas nevenkeblaj ventmuelejoj.

CHAPLIN, Charlie. Granda hometo de l'filmarto.

CSONTVÁRY, Tivadar (Kosztka, Mihály). Pentristo pli malnormala, ol eĉ la mondo.

DANTE, Alighieri. Elstara reprezentanto de la transmondliteraturo.

DONJUANO. Legenda viro, kiun multaj virinoj delogis.

DOSTOJEVSKIJ, Fjodor Mihailoviĉ. Oni lin suferigis en grandan verkiston.

EINSTEIN, Albert. De li ni scias, ke nia scio pri la mondo estas eksterordinare relativa.

FRANKLIN, Benjamin. Liaj politikaj spertoj instigis lin inventi la fulmoforigilon.

FREDERIKO, la Granda, I. La plej batalema burokrato de la mondhistorio.

GAGARIN, Jurij. Propre estis li, kiu ekvidis la unua la planedon nomatan Tero.

GAUGIN, Paul. Vera artisto, kiu retiriĝis de la mondo por ĝin ekkoni.

GOETHE. Disciplinita, nobela, frida vulkano.

GORKIJ, Maksim. Je sia feliĉo li trovis brilan romanfiguron en si mem.

GÖBBELS, Paul. Li opiniis, ke nesufiĉas la denaska krueleco de la homoj, sed oni devas ĝin pluevoluigi per sistema laboro informa kaj propaganda.

GRIMM, Jacob. Li uzis la artospecon konvenan al la matureco de l'homaro: li fabelis.

GUTENBERG, Johan. Li ne estas responsa pri tio, kiajn librojn oni presas per lia inventaĵo.

HABELO. Per troa mildo kaj mallerto li fariĝis komplico de la unua murdo.

HEIDEGGER, Martin. La esenco de lia filozofio: mi timas, do mi estas.

HEINE, Heinrich. Menso sana en korpo nesana.

HEMINGWAY, Ernest. Nemulte li taksis la homan vivon en sia vivo, nek en sia morto, nek en siaj verkoj.

HOMERO. Povas esti, ke li estis blinda, sed bone li povis elpalpi la mondon.

ĤRUSĈOV, Nikita Sergejeviĉ. Valida restos tiu lia politika tezo, ke paco necesas ankaŭ por la maizoproduktado.

ILF kaj PETROV. Ili simbolis tion, ke sen humuro ankaŭ socialismon oni ne povas konstrui.

IONESCO, Eugene. Li klopodis diveni la sensencon de ĉio.

JOZEFO, Sanktulo. La virga patro.

JOYCE, James. Nekompreneble granda verkisto.

ĴDANOV, Andrej Aleksandroviĉ. La internan ordonon de la verkisto li volis anstataŭigi per ekstera ordono.

KAFKA, Franz. La personeco de lia patro kaj la senpersoneco de la subprema potenco lin plenigis per angoro de mondliteratura valoro.

KRUPP. Grandindustriista familio vivanta el morto.

KUTUZOV, Mihail Ilarionoviĉ. Genia militestro, kiu ne malhelpis Napoleonon suferi malvenkon.

LENIN. Lia konvinko estis, ke la valon de la mizero oni povas fari produktiva.

LESSEPS, Ferdinand. En liaj kanaloj fluis ankaŭ sango.

LUCIFERO. Spirito de la negado, kiu bone scias, ke por la negado necesas ankaŭ spirito.

MAUGHAM, William Somerset. Meza verkisto de grandiozaj romanoj.

MAUPASSANT, Guy de. Li malkovris, ke la vivo konsistas el noveloj.

NAPOLEONO, I. Estro, poste kaptito de la mondo.

NOBEL, Alfred. Per siaj fondumoj li solvis la pacan utiligon de la dinamito.

PICASSO. Artisto konata per la reorganizo de la homa korpo.

POE, Edgar Allan. Fantomeske bona poeto.

REMBRANDT. Li prezentis al la mondo memportreton.

SOKRATO. Li diris en la mondo la plej belan toston kun venenglaso.

STALIN. Ateisto, kiu postulis, ke oni lin diigu.

TELLER, Ede. Patro de la hidrogenbombo, kiu konsterne fieras pri sia ido.

TITO, Josip Broz. Frue oni lin absolvis de la akuzo pri stalinismo.

U THANT. Kiel ĉefsekretario de UNO li povas trovi plejeble vastajn internaciajn kaŭzojn por sia stomakulcero.

WILLIAM, Tennessee. Li figuris la vivon en ties natura perverseco.

WRIGHT, Orville kaj Willbur. Dedalo kaj Ikaro kun motoro.

ZAMENHOF, Lazaro Ludoviko. Kreinto de artefarita lingvo patrina.

ZOLA, Émile. Naturalista verkisto, sufiĉe hardita por vidi la vivon tia, kia ĝi estas.

Tradukis: *Lajos Tárkony*

DOMFABRIKO

La domfabriko fondita de *Ada Csiszár* liveras ĉi-numere 80 parolpanelojn. Sciindaĵojn vd. en nia dua numero pasint-jara.

51. Ankaŭ mi ne estas neniu.
52. Io ajn mi fariĝu, se . . .
53. Se konsideri funde, tio estas vera.
54. Pendi sur ies lipoj.
55. La parolo svenis sur liaj lipoj.
56. Porti ankoraŭ infanŝuojn.
57. Li volus roli saĝulon.
58. Peti de dormo konsilon. Dormo donos konsilon.
59. En liaj vejnoj fluas lakto.
60. Lia vizaĝo enflamiĝis.
61. Mia vizaĝhaŭto forbrulas de honto.
62. Ĵeti insulton alvizaĝe.
63. Frapfermi pordon.
64. Trovi fermitajn pordojn.
65. Trafi al surdaj oreloj.
66. Mi estas nura orelo.
67. Transbarakti obstaklojn.
68. Barakti en financa embaraso.
69. Lupo en felo ŝafida.
70. Kuraĝe fronti danĝeron.
71. Brave ŝultri malfacilaĵojn.
72. Honorkoncerna afero.
73. Maljuniĝi en honoro.
74. Estas favore al lia honoro, ke . . .
75. Lia honoro restariĝis.
76. Faras nenion.
77. Ne deziri esti en ies haŭto.
78. Trafi en ies reton.
79. Akiri ies konfidon.
80. Enŝteli sin en ies konfidon.
81. Certa kiel morto.
82. Riski sian propran haŭton.
83. Eskapi kun sendifekta haŭto.
84. La sumo estos, se preni plej multe . . .
85. La vorto hokis al li en la gorĝo.
86. Jen estas la tubero.
87. Ekzemplodona puno.
88. Pekon meti sur pekon.
89. Pli bone ne kirli la aferon.
90. Elĵetite tra pordo, reveni tra fenestro.
91. Frapadi sur nefermita pordo.
92. Alpreni oficialan mienon.
93. Pasi al alia afero.
94. Puŝiĝi al obstakloj.
95. Paca kunekzistado (koekzistado).
96. Ne resti ŝulda pri respondo.
97. Amasigi ŝuldojn sur ŝuldojn.
98. Ŝuldo je honoro (de honoro).
99. Troa alto por via salto.
100. Ĝisosta olda fraŭlo.
101. Io krepuskas en lia kapo.
102. Ne povi elteni senvorte.
103. Montri siajn verajn kolorojn.
104. Montri siajn lupdentojn.
105. Respekti sin mem.
106. Mono elĵetita tra fenestro.
107. Dormi kiel pelto somere.
108. Nenio malhelpas, ke . . .
109. Ne mia zorgo.
110. Murmuri sub la lipharojn aŭ en sian barbon.
111. Malsekiĝi ĝishaŭte; tramalsekiĝi.
112. Konsisti el haŭto kaj ostoj.
113. Esti kolekto da ostoj.
114. Malgrasiĝi ĝisoste.
115. Ĝisoste penetra frido.
116. Trafrostiĝi ĝisoste.
117. Aspekti skelete.
118. Kovri ion per vualo (de forgeso).
119. Homo remburita per tristo.
120. Kun sako kaj pako.
121. Stulta kiel ses bovoj.
122. Pordpuŝe surprizi iun.
123. Trafi en la propran kaptilon.
124. Li tordas-retordas la aferon.
125. Trafi el unu mirsurprizo en alian.
126. Mieni al iu mielon.
127. Doni vorton de honoro.
128. Esti homo de sia vorto.
129. Trafi al sia homo mastra.
130. Necesas homo de brava koro.

K. Kalocsay

NOTO. — Pri la unuaj 25 paneloj ni ricevis ĝis nun reagon nur el nia lando. Ĉiu »panelo« estas solvita de iu, sed neniu solvis ĉiujn senerare. Ni atendas pluajn reagojn. S-don G. Csüllög ni informas, ke la domfabriko faros 5000 panelojn kaj ilin intencas eldoni en libro. La demanditaj vortoj estas: 1. magnetofonbendo, 2. telefondisko (oni diskas numeron), 2. torpor(et)i (loko de vangfrapo), 4. plastfolia aŭ plastlamena saketo.

H. V.

Novaĵoj el la Budapeŝta operdomo

En nia 2-a numero nunjara mi raportis pri la nova hungara opero *Hamlet*. Nun mi povas sciigi, ke en la kadroj de la ĉi-jaraj Budapeŝtaj Muzikaj Semajnoj la Operdomo de la hungara ĉefurbo prenis ree novan operon sur sian repertuaron, kies titolo estas *Peko kaj Puniĝo*, laŭ la konata romano de Dostojevskij. La komponisto, *Emil Petrovics*, estas juna homo, preskaŭ samaĝa kun la komponinto de *Hamlet*. La muzikamantoj memoras pri lia unuakta opero *C'est la guerre* (Jen la milito), prezentita en 1962 kaj akirinta belan kaj merititan sukceson. Ĝi estas plena de agado, de drama streĉo. La opero *Peko kaj Puniĝo*, male, enhavas antaŭ ĉio moralajn kaj psikologiajn konfliktojn, pli ol efektivan agadon videblan sur la scenejo. El tio sekvas, ke ĝiaj muzikaj esprimrimedoj devas esti aliaj, ol en *C'est la guerre* aŭ en la opero *Hamlet*, en kiu ĉiumomente okazas io.

Fakte, la tuta muzika mondo de la opero *Peko kaj Puniĝo* povas esti nomata pli »melodia«, nature en la senco de nia epoko kaj de ties artaj tendencoj.

Kiel en *Hamlet*, tiel same en la Dostojevskij-opero la komponado baziĝas sur la tn. *dodekafonio* (t. e. laŭ la koncepto, ke la muzikaj sonoj estas konsekvence, eĉ rigide egalrajtaj, kaj neniu el ili povas havi favoran pozicion, do ne devas esti ripetata pli ol aliaj sonoj). Sed ĉi tiu kompona metodo ankoraŭ ne estas tiel evoluinta, ke ĝi povu servi kiel arta esprimilo de individuaj karakteroj aŭ sentoj. En la nova opero la plej gravan rolon ludas la psika, interna vivo de la ĉefrolanto Raskolnikov, la dodekafonia metodo, siavice, estas sendube pli »objektiva« ol la tradicia formo de la muziko; el ĉi tio neeviteble sekvas, ke »Peko kaj Puniĝo« malpli altiras la intereson de la publiko ol la opero »Hamlet«, kvankam ĝi enhavas multajn elementojn, kiujn oni povas nomi »melodiaj« ankaŭ en la tradicia senco de la vorto.

La nuntempa opero travivas krizon kaj unu el ties ĉefaj kaŭzoj estas, ke la komponistoj tute ne aŭ almenaŭ nur kun la plej grandaj malhelpoj povas trovi konvenajn tekstojn kaj taŭgajn muzikajn esprim-metodojn.

* * *

Budapeŝto pli kaj pli certigas por si gravan rolon en la muzik-kultura vivo de la mondo kiel »muzika urbo«. Multnombraj muzikistoj, dirigentoj, instrumentaj interpretistoj kaj kantistoj gastadas ĉe ni en la koncertejoj kaj operdomoj. Nun ni menciu el ili nur kelkajn internacie konatajn operkantistojn, gastojn prezentiĝantajn en la Budapeŝta operdomo.

Laŭ tempa vicordo, unue devas esti nomataj du kantistoj: *Nikolai Gedda* en la operoj Faŭsto kaj Rigoletto kaj *Renato Scotto* en Traviata kaj Bohema Vivo.

Interesa evento estas la gastrolado de *Regina Resnik* el Usono, kiu prezentas sin kiel Carmen. Ankaŭ la itala kantistino *Zenaida Palli* kantos la rolon de Carmen kaj krome tiun de Delila. *Nicola Rossi—Lameni*, mondkonata basisto el Italio, ĉefrolos en Boris Godunov; estas menciinde, ke li estas ankaŭ fama poeto en sia patrujo. *Virginia Zeani* kantos en Madame Butterfly; *Renato Gioni* en Rigoletto kaj Maskobalo; ili ambaŭ estas italoj.

Elstara evento ĉi-sezona estas la gastrolado de la opera ensemblo de Bologna, kiu prezentos al nia muzikama publiko la operon *Mosé in Egitto* de Rossini. Espereble ankaŭ la Budapeŝta opera ensemblo havos sukceson, kiam ĝi reciprokos la viziton en Bologna.

Kiel videble, Budapeŝto sekvas la metropolojn de la muzika vivo ne nur en la kampo de la koncertoj, sed ankaŭ sur tiu de la opera kulturo de la mondo.

Lajos *Lesznai*

Hungaria libroeldonado en ciferoj

La Centra Statistika Oficejo eldonis interesan broŝuron kun la titolo: »Libroeldonado, bibliotekoj, periodaj presaĵoj, 1968«. En 1968 aperis entute 4588 libroj en 47 971 000 ekzempleroj. Jare aperas por 10 000 loĝantoj po 4—5 novaj libroj; el la tutlanda loĝantaro unu homo aĉetas meze po 4,7 nove eldonitajn librojn. La meza eldonnombro de libro estas ekde jaroj po ĉ. dekmil.

Inter 1964 kaj 1967 jare estis eldonitaj po 600—700 novaj beletraj verkoj, en 1968 ilia nombro estis 731. Laŭ eldon-nombro, el la vivantaj eksterlandaj verkistoj Georgo SIMENON staras kaploke kun tri verkoj kaj 284 000 ekzempleroj. El la jam ne vivantaj la listogvidanto estas W. Somerset MAUGHAM kun tri verkoj kaj 162 800 ekzempleroj. Estas interese, ke inter la tradukaĵoj de beletraĵoj kreskas la nombro de vivantaj verkistoj kompare al la malnovaj. En 1968 aperis 23%ojn pli multaj modernaj tradukitaj verkoj ol en 1964, — unuavice el la plumo de okcidentaj verkistoj.

Ni menciu, ke en la supre montrita eldonnombro partoprenas ankaŭ E-aj libroj en respektinda kvanto. La E-Hungara kaj Hungara-Ea vortaroj de a. *Pechán* (4-a eldono) aperis en 1968 en po 14 300 ekzempleroj, la lernolibro »Esperanto 2.« de St. *Szerdahelyi* en 10 000 ekzempleroj, la hungarlingva Sistema E-a Gramatiko de K. *Kalocsay* (dua eldono) en 11 000 ekzempleroj. Estas ekscite divenadi, kie estas tiuj multnombraj aĉetantoj kaj kiel oni povus ilin kapti por registrado kaj organizado.

La meza prezo de la libroj estas 20.70 forintoj, 13 %-ojn pli multekosta ol antaŭ kvin jaroj.

La plej granda fridigo-turo de Eŭropo



La glitkesta skafaldado principe ne estas nova metodo, ĝi estas jam kvindekjara, sed ĝis nun oni ne povis ĝin uzi por konstruo de turoj havantaj sekcon variantan, kiel ekzemple la fabrikaj fumtuboj, TV-turoj, fridigo- kaj akvoturoj, precipe se oni bezonis turojn tiel grandkalibrajn kiel ekzemple la frigido-turoj de la modernaj energiocentraloj. La solvo de la problemo, kiel multaj similaj, metitaj de la epoko en tagordon, maturiĝis ne nur unuloke kaj ne nur en unusola kapo. Du ekspertoj luktis kun la problemo paralele: la svedo Erik SVEN SVENSON kaj la hungaro József THOMA. Poste ili iel interkontaktiĝis, komencis kunlaboron, kaj, post jaroj, ili kune trovis la solvon. La sistemon ellaboritan ili nomis — el la kunigo de la unuaj silaboj de iliaj nomoj — SVETHO-SYSTEM. Poste, por utiligo kaj evoluigo de la inventaĵo, kreiĝis la akcia societo BYGGING-UNGERN 31 AB, kies nomo estas farita el la nomo de la sveda firmo de glitkesta skafaldado kaj de la Hungara Ŝtata Konstruindustria Entrepreno Nro 31.

Tio, certe, ne okazis de unu tago al alia, antaŭe oni devis pruvi, ke la sistemo eltenas la provon. Kaj tio pruviĝis per la konstruado de la 40 metrojn alta akvoturo de la urbo *Pápa;* ĝi havas periferion konstante kreskantan desube alsupre. Poste pretiĝis en *Szeged* la 60 metrojn alta akvoturo, kies konturoj similas du branĉojn de kruta hiperbolo. Kiel tria, konstruiĝas la fridigo-turo *Heller—Forgó* en la urbeto *Gyöngyösvisonta;* ĉi ties korpo kun ronda sekco havas malsupre 100-metran, supre — en alto de 116 metroj — 72-metran diametron, kaj ĝia murdikeco estas nur 17-centimetra. Kiam la turo atingis la 75-metran altecon, la interesiĝo jam estis pri ĝi tiel granda, ke de tiam la laboro okazas sub surloka observado de entreprenreprezentantoj el Britlando, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Pollando, Hispanio kaj Usono.

Unu miliono da svisaj frankoj por hungara kolekto de poŝtmarkoj

Eksterlandaj filatelaj fakrevuoj sciigis en tutpaĝaj anoncoj, ke la internacie konata firmo Schwenn aŭkcias en Zürich la plej grandan hungaran kolekton de la mondo. La aŭkcia proklamprezo estis unu miliono da svisaj frankoj. La enorma kolekto estis posedaĵo de Lévey, bankiero en Chicago, kaj enhavas tiajn raraĵojn — kompreneble el la klasikaj eldonaĵoj — ke troviĝas inter ili eĉ pecoj valorantaj 20—25 mil frankojn.

The Times pri la hungarlanda Shakespeare-kulto

Pro la granda ŝatateco, ofta, plurfoje seria prezentado de la dramoj de Shakespeare en Hungario, iu nomis ŝerce Shakespeare-on la plej granda hungara dramverkisto.

La angla ĵurnalo *The Times* antaŭ nelonge aperigis varmtonan artikolon pri la Shakespeare-kulto hungara. Tie li ripetas la supre cititan ŝercaĵon kaj skribas, ke, fakte, sur la bordo de Danubo Shakespeare malofte ripozas: ankaŭ nun tri Shakespeare-teatraĵoj estas spekteblaj en la ĉefurbo: la eminente surscenigita kaj jam delonge surprograma »*Rikardo la Tria*«, reĝisorata de L. *Vámos*, la »*Komedio de Eraroj*«, kiun reĝisoras St. *Egri*, kaj plej ĵustempe »*Timono de Ateno*« en la Nacia Teatro. Ĉi lastan la artikolo nomas iom stumblanta, ĉefe tial, ke ĝia reĝisoro, sub la influo de *Brecht*, uzas tro da artifikoj de »forfremdiĝo« sur scenejo similanta cirkan arenon.

Fine, la angla ĵurnalo proponas, ke la festivalo de Edinburgo aŭ la Mondteatro invitu la hungaran aktoron Nikolaon *Gábor* ludi la ĉefrolon de Makbeto aŭ de alia Shakespeare-dramo. N. Gábor ludis lastatempe la ĉefrolon de Hamleto kaj de Rikardo III., kaj la ĵurnalo lin nomas »Oliviero« de la hungaroj.

Korespondi deziras

Vidas Liubinas (26-jara laboristo), KAZLU RUDA, str. Taikos 12. Litovio, Sovetunio, dez. kor. kun ĉ. l. pri ĉ. t., kol. PM. kaj PI.

La gekursanoj de fraŭlino Liljana Ivanova, VELIKO TARNOVO, Cvetarska 17, Bulgario, dez. kor. kun ĉ. l. pri ĉ. t.

Nikolao Lisica (28 jara) KRIVOJ ROG 31, Baĵanovo, str. Industrialnja 1. Ukrainio, Sovetunio, dez. kor. kun ĉ. l. pri muziko, teatro, filmo, lingvistiko. Kol. PM kaj PI.

Fraŭlino Svetlana Ĉinoeva (24-jara instruistino) dez. kor. kun gvidantoj de E-rondoj en la tuta mondo kaj kun ges-anoj el Britio, Usono, Kanado, Hindio kaj Japanio. Ŝiaj 25 gelernantoj dez. kor. kun infanoj el ĉ. l. pri ĉ. t., kol. PM, BK. — Adreso: Klubo »GLOBUS«, Ŝkola 2, ul. Bratskaja 101, PRIMORSKO-AĤTARSK, Krasnodarskij kraj. Sovetunio.

Arvet Berg (15-jara lernanto) PIUATU, Viljandia distrikto, Estonio, Sovetunio, dez. kor. kun ĉ. l. pri muziko, sporto. Kol. PM kaj fotojn pri geaktoroj.

Indoneza esperantisto serĉas libron de Kalocsay titolitan »Dekdu Poetoj« kaj eldonitan de Literatura Mondo, Budapest 1934. Adreso: Eriko Sunardo, 10 avenue Alphonse XIII, Paris 16, Francujo.

F-ino Beata Olgusz (16 jara lernantino) SLUBICE/ODRA, ul. Yagielly 8/1, Pollando, dez. kor. kun hungaraj gejunuloj pri muziko, sporto k vivo.

S-ro Vjeko Peŝut (19 jara studento) Brestąca 48, NOVSKA, Jugoslavio dez. kor kun ĉ. l. pri ĉ. t., int. BK, PM. monerojn kaj Esp. insignojn.

F-ino Teresa Lacka (24 jara oficistino) GRODZISK MAZOWIECKI (apud Varsovio), ul. Traugutta 40., Pollando, dez. kor. kun ĉ. l.

Por aranĝota Esp. ekspozicio petas materialon (leterojn, bildkartojn, prospektojn, E-gazetojn, fotojn de E-grupoj ktp.) kun anticipa danko kaj posta rekompenco per bela bildkarto: s-ro Mieczyslaw Szostak, »Esperanto-Ekspozicio« GWOZNICA GORNA, pow. Strzyzow, Pollando.

S-ro Jahn Hans, Geb. — Weg 2., REICHMANNSDORF/THÜR, Krs. Neuhaus/Rwg. DDR. dez. kor. kun ĉ. l. pri ĉ. t.

S-ro H. Rudolph, 58 GOTHA, Töpferweg 12, DDR. dez. kor. kun ĉ. l. pri ĉ. t.

S-ino Nina Potehina (instruistino), str. Ĵdanova 15, kv. 90. ZLATOUST, Ĉeliabinskaja obl. Sovetunio, dez. kor. kun ĉ. l. precipe kun Hungario, Bulgario kaj Italio pri ĉ. t. Kol. BK.

Juzij Begapev, 33-jara instruisto do matematiko (str. Sovetskaja 104, ZIADIN, Samarkandskoj obl., Sovetunio) dez. kor. kun la tuta mondo pri matematiko, ŝako, damludo kaj int. E-librojn, BK., PM., muzikdiskojn, monerojn, insignojn, fotojn kaj aliajn memorajoĵn.

LETERKESTO

Ing. Karel Janouŝ, Ostrava, Ĉehoslovakio. Ni ricevis ĝoje kaj danke vian kontribuaĵon al la Domfabriko. Ni zorge ĝin studos kaj tiros el ĝi utilon. Rekompence, kiel al nia sola ĝisnuna eksterlanda domfabrikano-volontulo, ni sendas libron multsalute. DF.

*

S-ro Niku Tumi, redaktoro de »Planteto«, Tampere, Finnlando. Kun malĝojo ni legis Viajn amarajn liniojn, en kiuj Vi sciigas nin pri la ĉesigo de Via ĉarma revueto. Kiel kaŭzon de la ĉesigo Vi indikas la fakton, ke kaj en Via lando kaj en multaj aliaj landoj la infanoj devas lerni la anglan lingvon, kaj havas jam nek tempon, nek forton lerni ankaŭ kroman lingvon. Sekve de tio la minimuma nombro de 200 abonoj ne estas certigita, kiu cirkonstanco malebligas la pluan eldonadon de »Planteto«. — Ni havas la esperon, ke la situacio ne ĉie estas la sama. — Nome de multaj infanoj ni dankas al Vi la multan laboron kaj penadon dediĉitan tiucele, ke la revueto alportu ĝojon kaj instruon al la plej junaj civitanoj de Esperantujo, kaj kore ni bedaŭras ĝian ĉeson.

*

S-ano Lev G. Fiŝbejn, Uzlovaja, Sovetunio. Dankon pro Via letero de 24.10. 69. kaj la du fotoj. Same ni dankas Viajn bondezirojn okaze de la 50-jara datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, festata en la pasinta jaro en tuta Hungarlando.

*

Kvankam nur en la nuna numero, tamen kun ĝojo kaj agrabla sento ni dankas la afablajn salutvortojn senditajn al ni en la komuna letero de la 183 polaj kaj 88 alilandaj (el 12 landoj) partoprenintoj de la V-a Internacia Esperantista Ferio, disvolviĝinta en la pola montara ripozloko Miedzigorze, septembre de 1969. Ni deziras same agrablan amuzon al la ĉi-jaraj partoprenontoj.

S-ro Hector Boffejon, Brasschaat, Belgio. Kun ĝojo ni legis Viajn rekonajn vortojn koncerne nian revuon. Permesu citi ĉi tie kelkajn liniojn el Via letero: »Mi ne hezitas aserti ke, kun sia majstra tiel same interna kiel ekstera aranĝo, kiu donas al ĝi vere plaĉe modernan aspekton, kun sia interesa kaj altnivela enhavo ĝustproporcie priesperanta, literatura kaj informa pri via lando, kaj fine kun siaj perfekte belaj kaj fluaj lingvo kaj stilo, 'Hungara Vivo' estas la plej bona el la nun aperantaj Esperanto-revuoj.« — Niaj klopodoj celas, ke kiel eble plej multaj el niaj legantoj estu tiel same kontentaj pri nia revuo. Kore ni dankas Vian leteron.

*

S-ro Günter Bartz (Dortmund, Germanio). Kore ni dankas Viajn kristnaskan kaj novjaran bondezirojn kaj ankaŭ ni deziras al Vi feliĉan novan jaron plenan de ĝojo kaj sukcesoj.

S-ino Asta Christensen (Kopenhago, Danlando). Dankon pro Via letero, en kiu Vi informas nin, ke Pola Radio en sia „Esperanto-Angulo" por germanoj, plurfoje citis la artikolon „Alparolo", verkitan de s-ano G. Vigh en nia 3./69. n-ro. Koncerne Vian demandon pri la ĉesigitaj E-elsendoj de Radio Budapest, ni respondas, ke bedaŭrinde estas ekster nia povo aliigi la situacion. Ni opinias, ke la elsendoj ankaŭ hodiaŭ daŭrus, se la Esperanto-fako de Radio Budapest estus ricevinta almenaŭ tiom da leteroj, kiom ricevadas la ceteraj fremdlingvaj fakoj.

S-ro Ivan Hostinak (Opava, Ĉeĥoslovakio) donacis al la biblioteko de HEA unu ekzempleron de sia fablokolekto. Akceptu nian koran dankon.

NIAJ ZORGOJ HUNGARLANDAJ

Onidire imperiestrino de la Habsburga Monarkio, Maria-Terezia malpermesis konstruon de fabrikoj en la aŭstra ĉefurbo Vieno. Se oni promenadas en la stratoj de la iama imperiestra urbo (la urbo de la 55-a Mondkongreso de Esperanto en 1970), oni povas ĝui la konsekvencojn: la aero de la urbo estas pura kaj freŝa. Sed neniu malpermesis la konstruon de konstante fumantaj fabrikoj en la alia ĉefurbo de la Monarkio, en Budapeŝto. La hungara ĉefurbo, »la perlo de la Danubo« luktadas kontraŭ la moderna malsano de urbegoj: la malpuriĝo de la aero.

Dum la periodo de la industriigo oni ne konis la modernan nocion de »urba planado«, kaj uzinoj, fabrikoj estiĝis en la ĉefurbo sendepende de higienaj kaj estetikaj vidpunktoj. Post la liberiĝo, sed precipe ekde la komenco de la sesdekaj jaroj komenciĝis procezo: transloki la industriajn entreprenojn al la provinco. Tamen estas ankoraŭ multe da fumtuboj kaj fumtubegoj superŝutantaj kelkajn partojn de la ĉefurbo per fumo kaj fulgo.

La ĉesigo de la malpuriĝo estas multekosta afero. Oni devas senfabrikigi la ĉefurbon kaj ĉesigi la hejtadon per karbo kaj anstataŭigi ĝin per gashejtado. Feliĉe, Hungario havas abundajn gastrovejojn kaj ni esperas, ke Budapeŝto baldaŭ liberiĝos de la malagrabla vintra malsano, la aermalpuro.

* * *

Estas laŭmode en Hungario (kaj ankaŭ alilande) riproĉi la televidajn programojn. Kiel ĉe ni statas la afero efektive?

Unue ni komparu la programon de la Hungara TV kun la programo de la Hungara Radio. Kvankam ambaŭ telekomunikiloj estas organoj de la sama centra instuticio, tamen estiĝis konkuro inter TV kaj Radio. Kiam TV aperis en hungaraj hejmoj, oni pensis, ke la radio baldaŭ malmoderniĝos kaj nur blinduloj aŭskultos ĝin. Sed tio ne okazis. Entuziasmaj radiistoj prilaboris novajn modernajn metodojn por konverti la perditajn aŭskultantojn. Ili kuraĝe eksperimentadis kaj kreis eksterordinare interesajn programojn. Nun do daŭras la granda rivalado por la altiro de la publiko.

Komence oni sidis antaŭ la televidaparato kaj rigardis ĉion. Poste oni konstatis, ke la televido ne povas prezenti sufiĉe da programoj originale televid-karakteraj. Kvankam la nombro de la televidaparatoj rapidege kreskas (10 milionoj da loĝantoj, unu kaj duono milionoj da aparatoj en 1969), pretendemaj homoj preferas la radion al la televido, ĉar la televidistoj ŝajnos havi malpli da fantazio ol la radiistoj. Domaĝe, ĉar TV estas la plej moderna telekomunikilo de nia epoko.

Gábor *Vigh*

POLAJ OKCIDENTAJ TERITORIOJ

de Tadeusz Deriatka kaj Józef Lubojanski. Trad.: Jerzy Grum kaj Jerzy Uŝpienski. Eld. Okcidenta Presagentejo, Warszawa. 200 pĝ. Kun ilustr. kovrilo.

La titole nomitaj teritorioj, reakiritaj laŭ la Potsdama traktato, konsistigas la trionon de Pollando; ilin, grandparte detruitajn, forlasis la germana loĝantaro post la dua mondmilito. La libro informas pri ilia pasinto kaj nuntempo, pri la heroa fortostreĉo de la enloĝigitaj poloj en tiuj regionoj kaj demonstras per statistikaj ciferoj ilian saltecan progreson kaj ekonomie kaj kulture. La okcidentgermanajn pretendojn la libro refutas per gravaj multflankaj argumentoj. Por vojaĝantoj aparte gravas la koncizaj priskriboj kaj multaj bildoj pri la vidindaj naturbelaĵoj. La teksto, bone presita sur bonkvalita papero, estas klara kaj bonstila, nur kelkfoje iom peza. Mankas glosoj pri lokaj-naciaj esprimoj (ekz-e trogbesto) kaj novaj vortoj (steli, centnaro k. a.). Entute: havinda libro.

INVITO AL ĈEĤOSLOVAKIO

Eld. Ĉeĥ. Esp. Komitato, 1968. 15 × 21 cm, 96 pĝ. Prezo: Kĉ. 13.—

Al la ĝojinde plimultiĝantaj E-lingvaj libroj pri landoj kaj regionoj, post la bonega gvidlibro pri Prago, salutinde alviciĝas nun ĉi tiu tre belaspekta libreto, dankinde preparita okaze de la 50-a datreveno de la fondiĝo de l'respubliko.

»La landon koncize« estis ŝajne la devizo de la redaktoroj. Tra la tuta lando, tiom multfaceta, flugas la leganto helpe de belegaj fotoj kaj lertaj kurtaj priskriboj: la tuto prezentas mem veran belecon kaj vekas fortan deziron viziti la landon. Vojaĝplanon plezuran kunmeti helpos la libreto ankaŭ per la dono de listo de E-rondetoj. La nivelon de la preciza eleganta traduko garantias la nomo de Tomáŝ Pumpr.

Ĝuste nun, kiam la Ĉeĥoslovaka popolo festas la 25-jaran jubileon de sia liberiĝo, medite kaj simpatie ni legas pri la heroaj kontraŭnaziaj bataloj, pri *Lidice, Terezin, Dukla* k. a., indaj por esti omaĝe vizitataj. *Fratan saluton al la ĉeĥoslovakaj samideanoj.*

Ervin *Fenyvesi*

Jeroŝenko en la ukraina lingvo

En la pasinta jaro ĉe la ukraina eldonejo »Molodj« aperis 260-paĝa kolekto el la verkoj de la mondvagulo-esperantisto V. Jeroŝenko, kiu estas unu el la plej interesaj figuroj de nia literaturhistorio. La volumon — kiu aperis en 65.000 ekzempleroj — redaktis kaj tradukis el Esperanto al la ukraina lingvo Nadja ANDRIANOVA. Ŝi verkis ankaŭ longan, 28-paĝan, enkondukan eseon, en kiu multe estas pritraktata ankaŭ la esperantista kariero de la aŭtoro. Kiel s-ino Andrianova, tiel ankaŭ la eldonejo »Moldoj« faris grandan servon al nia movado per la aperigo de la volumo: tiu ĉi libro ja pli ol cent informaj prelegoj pruvas la ekziston de la Esperanta literaturo. La titolo de la kolekto estas »Kvitka Spravedlivosti« (Floro de Justeco), ĝi kostas 61 kopekojn.

(benczik)

EL LA HUMURO DE 25 JAROJ

La antifaŝista papageto

Komence de 1945, kiam la sovetaj trupoj batalis jam antaŭ Budapeŝto, maljunulo trovis en la fenestro buntan papageton mizere tremantan; certe ĝi rifuĝis el bombdetruita hejmo. Rapide alkutimiĝinte al la nova zorganto, ĝi baldaŭ montris sian kapablon: ofte ekkriis laŭte: »Krevu Szálasi! Krevu Szálasi!«

Szálasi (pron. Sa:laŝi) estis la hungara Quisling, la partia ĉefo de la sagokruculoj, la maljunulo do, kvankam li samopiniis kun la kuraĝa papago, laŭeble gardis sin de tio, ke ĝin aŭdu fremdaj oreloj. Tamen ĝin ekaŭdis foje lia najbaro, funkciulo de la sagokruca partio. Furioze li kuris en la ĉambron kaj krie postulis, ke la maljunulo sekvatage aperu en la partia centro kune kun la papago.

La teruriĝinta maljunulo — kien kuri? — rapidis al sia pastro; eble ĉi tiu donos ian konsilon savan.

— Trankviliĝu, — diris la pastro. — Mi havas papagon similan al la via; ĝi scias nur kelkajn partojn el la Patro-Nia. Kunportu ĝin do anstataŭ la via.

Sekvatage en la sagula centro komenciĝis la konfesigo de la papago kaj ĝi daŭris longe, sed la birdeto eĉ ne pepetis. Oni nun devigis la maljunulon, ke li antaŭdiru al la birdokrimulo la fatalajn vortojn, kaj li faris tion tremante, klarigadis, ke temas pri trovita birdo, sed neniu tion atentis. Fine la denuncinto mem volis pruvi, ke li estis prava kaj instigis la birdon komence milde, susure, karesvoĉe, poste subite senpacience, laŭte, leonhurle: »Krevu Szálasi!« Kaj nun la pastra papago ekvoĉis, dirante kun pia, preĝkadenca tono:

— Plenumiĝu via volo.

Trovema kampulino

Sociologia esploristo pridemandis en iu vilaĝo ĉarman kampulinon. Evidentiĝis, ke ŝi estas abiturientino kaj administrantino en la loka agrokooperativo. La sociologo plaĉe okupiĝis pri la alloga virino, spicis la demandojn per ŝercaj tikloj kaj pikoj; ĉi tiujn sprite returnadis la virineto. Je la fino la esploristo riskis la jenan ŝercon:

— Kara ĉarminjo, jen estas ankoraŭ rubriko plenigota: kiomfoje vi kokris vian edzon?

La virineto ruĝiĝis, sed post nelonge jam ridetante respondis:

— Enskribu simple la landan meznombron de la lastaj jaroj.

Politiko kaj fromaĝo

La hungara ĉefministro *J. Fock*, vizitante Francujon, foje partoprenis lunĉon ĉe *O. Guichard*, ministro de industrio. La lunĉon, laŭ franca kutimo, finis fromaĝo, kaj tiam la franca ministro menciis, ke en Francujo oni produktas ĝin en 380 diversaj specoj. Kaj li tuj aludis ankaŭ diraĵon de prezidanto *de Gaulle*, ke estas malfacile regi landon, kie troviĝas tiel multaj specoj de fromaĝo. Poste li demandis:

— Kiom da specoj de fromaĝo troviĝas en Hungarujo, sinjoro ĉefministro?

— Multe malpli ol en Francujo — respondis J. Fock — tamen ne kredu, ke tial la regado ĉe ni estas pli facila.

Por kio ŝi riskus?

Post 1950 oni faris ĝenerale deviga la filtroekzamenon de virinoj koncerne kanceron. En iu regiono apud Tibisko kelkaj maliculoj disvastigis la famon, ke post la filtroekzameno la virinoj naskos nedeziratan infanon.

La stulta misfamo apenaŭ trovis kredon. Tamen okazis, ke kamparanino vizitis la filtroekzamenan stacion kaj diris al la kuracisto:

— Kara sinjoro doktoro, jam delonge mi kaj mia edzo deziras infanon. Mi volonte riskus eĉ kancer-filtradon por havi finfine infanon.

Kio ŝi fariĝus?

Post la liberiĝo, seruriston, malnovan sindikatanon, oni »ellevis«: li fariĝis ministeria sekciestro. Tiutempe tia afero ne estis rarajo, tamen ĝi vekis sensacion en la najbararo kaj multaj vizitis la edzinon de la promociito por ŝin gratuli. Inter la gratulantoj estis ankaŭ ĝentilhomema burĝino, kiu, flankentirinte la virinon, diris al ŝi mielvoĉe:

— Ho, kiel bela kariero, kara Marinjo, kia feliĉo, kaj tamen kia bedaŭrindaĵo! Se ne regus ĉi tiu aĉa demokratio, oni nun titolus vin *ŝia nobladigna moŝto.**

El la kolekto de Imre *Szenes*.
Trad.: Ervin *Fenyvesi*.

* En la iama Hungario ekzistis severe fikŝita eskalo de titoloj. La oficistoj oficiale estis nomataj laŭ rango 1. respektinda sinjoro, 2. grandmoŝta sinjoro, 3. nobladigna sinjoro, 4. ekscelenca sinjoro (por regento Horthy oni kreis la specialan titolon: ĉefnobladigna sinjoro). Ministeria konsilisto (nuna ĉefsekciestro) estis titolata »nobladigna sinjoro«. La edzinoj estis same titolataj sinjorinoj.

Ankaŭ en la nuna Hungarlando ne mankis zorgoj pri titolado. La titolo »sinjoro« havis post la liberiĝo malbonan sonoron, ĉar per ĝi antaŭe estis titolataj nur bienuloj, burĝoj, oficistoj, maksimume metiistoj-majstroj, sed neniam simplaj laboristoj aŭ kampuloj. Tial komence oni uzis vorton konforman al »kamarado«, sed ties hungara formo signifas »samprincipano«, »samideologiano«, kaj estis komike, kiam komunisto kaj reakciulo tiel titolis sin reciproke. »Civitano« ne ta gis, ĉar ĝia hungara ekvivalento estas »burĝkunulo«. Enmodiĝis do la alparolo »kartárs«, »szaktárs« (= kolego, samfakano), sed sonis strange, se ekz-e universitata profesoro kaj ŝuisto tiel titolis unu la alian. Fine oni rekonis, ke oni devas *demokratiigi* la alparolon »sinjoro« kaj »sinjorino« per tio, ke oni donas tiun titolon senescepte al ĉiuj, dum »kamarado« estu uzataj de sampartianoj kaj »kolego« de samfakanoj inter si. La kutimo ankoraŭ ne ĝeneraliĝis tute, sed disvastiĝas kaj ŝajnas fine solvi la problemon. *(Red.)*.

El la 2-a numero

Vilmos Benczik: Morto de Ŝanek — novelo
Sándor Hemberger: La Hungara arto en la kurento de la internacia kooperado
D-ro Otto Haszpra: Pri kvinkontinenta vojaĝo de inĝeniero
Milán Füst: Poemoj
Nur por virinoj
K. Kalocsay: Domfabriko
Gábor Vigh: Zorgoj Hungarlandaj
Ferenc Karinthy: Novelo
Ponori Thewrewk Aurél: Portreto pri fizikisto

El la leteroj

Al. Prof. J. Régulo Pérez. Koran dankon por la rekonaj vortoj; esperante vian depostan permeson ni citas el ili kelkajn: *„Mi estas ravita de tiu renovigita revuo. Mi opinias, ke mi ofendas neniun alian, se mi asertas, ke . . . ĝi estas eble nia plej altkvalita revuo. Mi legis . . . kaj mi dankas kaj gratulegas. Mi legis . . . la prozaĵon de M. A. Asturias kaj P. Neruda (ne facilan taskon vi elektis, kiam vi decidis tiujn tradukojn de vinoj) kaj plian fojon mi estis ravita . . . Sen tiu revuo ekde nun mi sentus min manka je Esperanta gravaĵo! Dankon, dankegon refoje!*

LA FERVOJISTA ĈEFSEKCIO DE HEA

La 17-an de januaro aranĝis festan kunsidon okaze de la 25-jara datreveno de liberiĝo de Hungario. Prezidis inĝ. Lajos Dér, festparolon faris d-ro Imre Pethes. Post arta fortepianludo de István Lantos kaj deklamado de Zoltán Sellei nome de la eksterlandaj kolegoj diris salutvortojn L. Szekeres el Jugoslavio. Alparolis i. a. d-ro István Bácskai, Béla Berceli, Mici Jurák, d-ro István Szerdahelyi, Ambrus Tóth (Debrecen), Ica Inkei, Ludoviko Kökény.

Invito

Muzeo de J. A. Komensky (Comenius) en urbo Přerov-Ĉeĥoslovakio, kune kun Ĉeĥa Esperanto Asocio kaj Sekcio de instruistoj de ĈEA, aranĝos en urbo Přerov, ek de 25- ĝis 30a de julio 1970 antaŭ la 55a U. K. de Esperanto en Vieno,

Internacian konferencon
pri J. A. Komensky

omaĝe al 300 jara mortdatreveno de eminenta pedagogo kaj pensulo.

Interesuloj bonvolu skribi pri Invitilo kaj pri informoj al la jena adreso. Muzeum J. A. Komenského, PhDr. Gustav Vožda, direktoro, Horni nám, č. l. Přerov — Ĉeĥoslovakio.

GLOSARO:

delico: delikata plezuro;
diskordo: malkonkordo;
filandro: subtila fadeno ŝvebanta en aero malfrusomere;
friska: malvarmeta;
kantileno: orelflata melodio;
linda: beleta;
lirli: agrable plaĉdeti;
lontana: malproksima;
nociva: malutila;
optimumo: plejeble bona stato aŭ okazo;
skoldi: malla di, riproĉ-admoni;
svaga: malcerta, malfacile difinebla;
titubi: paŝadi ŝanceliĝante (de ebrio aŭ svenemo);
vituperi: vd. skoldi.

ABONO DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62, P. O. Box 149. — Abonprezo por unu jaro en Usonaj dolaroj = 2,—

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

AŬSTRIO: Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A—1200, WIEN I. Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A—1011, WIEN I.

AŬSTRALIO: Cosmos Bookshop, 133 Ackland Street, ST. KILDA Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGIO: Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BRAZILO: Livraria Brody Ltd., Caixa Postal 6366, SAO PAULO. Livraria D. Landy Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO

BRITIO: Collet's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH. The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

BULGARIO: Direkzia R. E. P. 11 Pl. Slawejkov SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO: P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2. P. N. S. — dovoz tisku Leningradska 14, BRATISLAVA

ĈINIO: Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

DANLANDO: Hunnia Books and Music Langemosevej 37, BAGSVAERD. Ejnar Munksgaard Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.

FINNLANDO: Akateeminen, Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCIO: Agence Littéraire et Artistique Parisienne 7 Rue Debelleyme, PARIS 3. Société Balaton 12 Rue de la Grande Batelière, PARIS 9.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO: Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO: Újváry-Griff Titurel strasse 2, 8 MÜNCHEN 81. Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34. Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1. W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

ISRAELO: Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV Lepac Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA A. Fischer, R. Strauss 3, JERUSALEM

ITALIO: Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

JAPANIO: Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO: Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27, BEOGRAD

KANADO: Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Arthur Street West, MONTREAL 18. Que. Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

KOREO: „Chul Bo" PHENJAN

NEDERLANDO: Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

NORVEGIO: A/S Narvesens Litteratur Tjenste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

POLLANDO: P. K. W. Z. Ruch, ul. Wronia 23, WARSZAWA

RUMANIO: OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI OSEP, ORADEA

SOVETUNIO: Sojuzpechatj. Import, Prospekt Mira 112—a MOSKVA

SVEDIO: A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, 110 10 STOCKHOLM 1. A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, 114 37 STOCKHOLM 5.

SVISIO: AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200. Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55, ALLSCHWILL

USONO: Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Scond Ave., NEW YORK 10028. Corvin Travel and Gift Parcel Service, 1590 Second Ave., NEW YORK 10028. Hungarian Books and Records 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21—105, C. 24. CARACAS

VJETNAMO: Phong Phat Hanh Bao Chi 17, Dinh Le. HANOI

Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 1-a paĝo!

NOVA SENTO

Fragmento el poemo de Julio Baghy



Vertikale: 1. Konsonanto. 2. La dio de la amo. 3. Itala urbo. 4. Prepozicio. 5. Sufikso. 6. Bela birdo faras antaŭ sia morto. 7. Finaĵo de substantivo. 8. Malgranda homo. 9. Konsonanto. 10. Oni faras, kiam regulas la lumon. 11. Prefikso. 12. Virina nomo, inverse. 13. Mineralo. 14. Opero. 15. Konsonanto. 22. Kontinento. 23. Similas al vorto: ekscesa. 25. Parto de la homa korpo. 27. Metiisto uzas ĝin. 28. Korelativo. 31. Danĝero por la maraj ŝipoj. 33. Nokta jako. 38. Dipatrino. 43. Similas al la vorto: malsukcesulo. 44. Reĝo de la bestoj. 45. Speco de la lacertoj. 49. Mallongigo de la vorto: kilovolto. 53. Ne estas nuna. 55. Homa eco. 59 . . . cio, homa sento. 62. . . . bo, similas al horizontala 65-a vico. 64 Unu estimas la. . . . 66. Ne malbona. 68. Valormetalo, kun artikolo, sen finaĵo. 69. Komparativo. 73. Tro malgranda, sufikso substantivigita. 74. Adverbo. 76. Prepozicio. 77. Prefikso. 79. Finaĵo de substantivo. 80. Konsonanto. 81. Konsonanto.

Horizontale: 16. Finaĵo de substantivo. 17. La bundo kutimas fari. 18. Kompletigi iun objekton. 19. Konsonanto. 20. Ĉiu homo havas ĝin. 21. Oni uzas ĝin, ĉefe en vintro. 24. Ricevilo. 26. Per piedo oni faras ĝin. 27. Oni klarigas al iu. 29. . . . udo, religia skribaĵo. 30. Konsonanto kun finaĵo. 31. Virina nomo sen finaĵo. 32. Pragreka mono. 34. Loka adverbo 35. La finaĵo de imperativo. 36. Oni faras ĝin per vipo. 37. Oni faras kun soldatoj. 38. . . . ida, la kelo **ku**timas esti tia. 39. Prefikso. 40. Lando en sudokcidenta Azio. 41. Urba trafikilo. 42. La finaĵo de adjektivo. 43. Valora lignaĵo. 47. Konata rivero en Ruslando. 48. . . . pulo, similas al vorto: dubo. 50. . . . owo, urbo en Pollando, proksime de Gdansk. 51. Konsonanto. 52. La kurteno kaj la glavo havas ĝin. 54. Manĝaĵo, farita el ovo. 56. Poseda pronomo. 57. La finaĵo de adverbo. 58. Literoj el la vorto: tri. 59. Averto pri malsano (populara esprimo). 60. Konsonanto. 61. Virina nomo. 63. Parto de la jaro. 64. Sufikso. 65. Similas al la vorto: memfido. 67. Pragreka mono. 70. Artikolo. 71. . . . ra, virina nomo. 72. A. O. C. 73. . . . la piloto el la flugmaŝino. 75. Akvo en franca lingvo, fonetike. 77. Titolo. 78. . . . ou, manĝaĵo, la litero ĝ sen supersigno. 79. Derivilo de la frakcioj. 80. Trinkaĵo

Ensendendaj: horizontala 1. vertikalaj 20. 46.

Szilárd *Bálint*

La solvo de la kruĉvortenigmo aperinta en la Hungara Vivo No. 3/69 tekstas:

Senmova ĉio kvazaŭ
Haltis la temp'
La mond' momente festas
L'alvenon de l'Printemp'.

El la solvintoj de nia kruĉvortenigmo gajnis libropremion: Miroslav Hromas, Myslivečkova 479, Hradec Kralové, ČSR. Molnár Anna Eziist u. 43, Agárd. Dumitrasku Mihai, str. Emil Racovita 31, Constanta, Romania.

— Antaŭ pli ol mil jaroj okazis, ke la hungaroj, veninte el oriento, okupis sian nunan patrujon, kaj ekzistas kverko apud la vilaĝo Ziliz, proksima al Miskolc, kiu, en sia arbida aĝo, povis esti atestanto de tiu evento. La kverko, travivinta jarcentojn de historio, ankaŭ nun produktas siajn ĝermojn ĉiuprintempe; ĝian trunkon povas ĉirkaŭfermi nur man-en-mana ĉeno de 12 homoj. Oni gardas ĝin per deklaro »protektata«. La naturscienculoj volus scii precize ĝian aĝon; tial oni nun boros la trunkon kaj el la jarringoj difinos, kiom da jaroj fakte vivis la arbego.

Centro de Eŭropo

Simpatian kaj ĉarman gaston ni havis en oktobro: *Nadija Nikolaevna Andrianova*. En la esperantistaj grupoj ni povis ĝui ŝiajn interesajn kaj klerajn prelegojn. Ŝi alportis ankaŭ kelkajn Esperantajn eldonaĵojn, ĝojigajn signojn pri tio, ke la esperantista vivo en Ukrainio ne nur ne ĉesis, sed eĉ multe vigliĝis dum la lastaj jaroj.

El la enhavo de la 2-a numero de »Tra Soveta Ukrainio« mi citas nur unu artikolon, por ni speciala interesan: »Raportaĵo el centro de Eŭropo« verkita de Vitalij Ŝevĉenko:

»Temas pri geometria centro de Europo.
Ĉu vi scias, kie ĝi situas?

Aŭstraj—hungaraj sciencistoj en la jaro 1887 atestis, ke ĝi troviĝas en Karpatoj. Ili starigis tie la konforme surskribitan ŝtonon, kiu ĝis nun staras samloke. Sur la ŝtono estas ĉizita per latinaj literoj sciigo, ke aŭstraj—hungaraj sciencistoj post longaj kalkuloj, helpe de la plej ekzaktaj aparatoj konkludis: la mezpunkto de Eŭropo estas precize ĉi tie. Kaj apude staras la dato: 1887. En la dua mondmilito ĉirkaŭ ĉi tiu ŝtono fajfis kugloj. Unu el ili elbatis kaveton en la surskribo.

La ŝtono staras sub la monto ĉe la ŝoseo Rahivo-Uĵhorodo, ĉirkaŭ 11—12 km-ojn de la urbo Rahiv.«

En la plua parto estas rakontate, ke proksime al la marmorŝtono, en la vilaĝo *Dilove*, neniu scias, ke ili loĝas apud la centropunkto de Eŭropo, ĉar antaŭe ili estis plejparte analfabetoj kaj ankaŭ nuntempe ili ne scias la latinan lingvon.

Al ĉi tiu artikolo ni devas aldoni kelkon korektantan. La ŝtono ne signas la mezpunkton de Eŭropo, sed estas *triangulacia bazpunkto*, unu el la kvar, kiuj troviĝis en Hungario.

La inĝeniera triangulacio de Hungario estis farata ekde 1862 ĝis 1913; ĉi tiu memorŝtono estis starigita en 1887.

Cetere la korekta teksto latinlingva, kun la kompletigo de la difektiĝintaj partoj, estas jena:

LOCUS PERENNIS
DILIGENTISSIME CUM LIBELLA LIBERATIONIS QUAE EST IN AUSTRIA ET HUNGARIA CONFECTA CUM MENSURA GRADUM MERIDIONALIUM ET PARALLERORUM QVAM EUROPAM VOCANT ERECTUM MDCCCLXXXVII

kies Esperanta traduko estas:

Loko permanenta
difinita plej ekzakte per triangulacio, farita en Aŭstrio kaj Hungario per mezurado, nomata Eŭropa, de longitudaj kaj latitudaj gradoj. 1887

Do tamen la loĝantoj de Dilove, kvankam nekonante la latinan lingvon, estas pravaj, kiam ili ne opinias esti la centro de Eŭropo. La ŝtono ne signifas la mezpunkton de nia kontinento, sed estas nur bazpunkto de geodezia mezurado.

Sándor *Szathmári*

medimpex

Hungara Eksterlandkomerca Entrepreno
pri Farmaciaj Produktaĵoj

Budapest, 5. • Poŝtkesto 126

EKSPORTAS-IMPORTAS

Farmaciaj specialaĵoj • Farmaciaj bazmaterialoj • Vakcinaĵoj por hom- kaj best-terapeŭtikaj celoj • Veterinaraj drogoj • Furaĝaldonaĵoj • Laboratoriaj kemiaĵoj • Biokemiaj produktaĵoj • Radioaktivaj produktaĵoj • Volatilaj oleoj • Kuracplantoj • Resanigaj kaj amaraj akvoj

TANNIMPEX

Eksportas la hungarajn ŝuojn de eminenta kvalito,
elegantajn peltmantelojn
kaj unuaklasajn, laŭmodajn gantojn
kaj led-galanterivarojn

TANNIMPEX

BUDAPEST, VI. VÖRÖSMARTY UTCA 35.